

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2021. №3



## Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2021. №3 (309)

**La Ondo de Esperanto** aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redakcio:**

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Sergio Pokrovskij

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

**Retpoŝtaj adresoj:** sezonoj@kanet.ru, laondodeesperanto@gmail.com

**Retejoj:** <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

**Abontarifo por 2022**

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

**Anonctarifo**

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represoj:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2021, №3 (309).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 29 сентября 2021 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	2
En ĉi tiu numero .....	3
<b>Eventoj</b> .....	<b>5</b>
La 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj .....	6
Povilas Jegorovas. La urbestro de Klajpedo – Alta Protektanto de BET-56 .....	9
Povilas Jegorovas. UEA donis sian aŭspicion al BET-56 .....	10
Povilas Jegorovas. BET-56: Gravaj interkonsentoj en Klajpedo .....	11
UEA survoje al financa resaniĝo .....	12
La libroservo de UEA translokiĝos al Slovakio .....	14
14 elstaraj agantoj diplomitaj dum la 2a Virtuala Kongreso de UEA .....	15
Nova membro de la Honora Patrona Komitato de UEA .....	16
La Premio Deguĉi 2021 al Stefan MacGill .....	17
La Estraro de TEJO por 2021-2022 .....	18
Jeanne Grimaud. Bjalistoko daŭre aktivas .....	19
Povilas Jegorovas. Litovia mozaiko .....	21
Vytautas Šilas. Malgraŭ la pandemio kaj malbona vetero .....	22
Bert Schumann. Realaj renkontiĝoj en kastelo kun sanitaraj kondiĉoj .....	24
Amri Wandel. Nova Esperanto-sidejo en Tel-Avivo .....	26
Wang Guiying. Esperanto-kurso de Hubei-a Esperanto-Asocio .....	27
Rekorde intensa kultura monato en Svislando .....	28
Katerina Arbekova. Renkontiĝo de Amikoj revenis al Altajo .....	29
Aleksandr Lebedev. Nova konsisto de la organoj de REU .....	30
Irina Gonĉarova. “Lev Tolstoj” kaj MASI komune kunvenis .....	31
Werner Pfennig. SEFT: Familia tendaro por memzorgantoj .....	32
Iĝu Komitatano B de TEJO .....	33
Pri vortordo en Esperanto .....	34
Mireille Grosjean, Ahmad Reza Mamduhi. Nova estraro de la instruista ligo .....	34
La ĉeftemo de la 107a UK en Montrealo .....	35
UEA invitas prelegi en Montrealo .....	36
Kreema Esperanto Kurso en Schwerte .....	36
Lu Wunsch-Rolshoven. La 19a NR: Post tri monatoj en Wiesbaden .....	37
JES 2021/2022 okazos en Wittenberg .....	37
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. György Nanovfszky forpasis .....	38
<b>Tribuno</b> .....	<b>39</b>
Vytautas Šilas. Per Esperanto al la havenurbo Klajpedo .....	40
Stanislav Belov. Disiĝi por kuniĝi: Meditoj de nemovadano pri la estonteco de la Esperanto-movado .....	46
Lu Wunsch-Rolshoven. Subtenu Esperanton en la konferenco pri la estonteco de Eŭropo .....	52

Anatolij Ionesov. Vortoj pri Samarkando: Internaciaj letertagoj.....	54
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Paco .....	55
Ahmad Reza Mamduhi. Premio Maŭro La Torre.....	56
<b>Arkivo .....</b>	<b>57</b>
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2021 .....	58
Osmo Buller. Marianne H. Vermaas, la brava virino.....	61
Ernest Drezen. Tezaro pri la organizaj demandoj de Ruslanda Tutesperanta movado. .	65
Katerina Arbekova. Renkontiĝo de Amikoj jam 20-jara.....	69
<b>Kulturo .....</b>	<b>71</b>
Aleksander Korĵenkov. La fino de l' eterno.....	72
Rusaj romanoj de la 20a jarcento .....	73
Valentin Rasputin. Adiaŭo al Matjora: Ĉapitroj 1-3 (Tradukis Aleksander Korĵenkov) ..	74
Przemysław Wierzbowski. La plej fama pollingva sciencfikcia verko .....	90
Stanisław Lem. Solaris: Ĉapitro 1 (Tradukis Przemysław Wierzbowski) .....	91
Miĥail Korotkov. Sovaĝa kuglo.....	98
Julian Modest – nova PEN-prezidanto.....	102
Paulo Sérgio Viana. Ebrulo .....	103
Miguel Fernández. Pliafoje. Poezio-1. Poezio-2 .....	106
Wolfgang Kirschstein. La unua verko de Roth en Esperanto (Recenzo: Joseph Roth. <i>Hotelo Savoy</i> ) .....	109
Jorge Camacho. Ĉio krom genio (Recenzo: Valentin Melnikov. <i>Ni vivas malgraŭ ĉio</i> ) .	111
Paŭlo Moĵajevo. Simpla memorajo pri Gondolando (Recenzo: Korvaks. <i>Memorante Gondolandon</i> ) .....	113
Miguel Gutiérrez Adúriz. Rezultoj de la Belartaj Konkursoj 2021.....	114
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2021, N°41 .....	116
Aleksander Korĵenkov. <i>Unesko-Kuriero</i> , 2021, N°2 .....	117
Juna kaj nia junia <i>Literatura Foiro</i> .....	118
Paweł Fischer-Kotowski: nova redaktoro de <i>Kontakto</i> .....	119
Flo Martorell. <i>La Espero</i> sambas.....	119
<b>Mozaiko .....</b>	<b>120</b>
Halina Gorecka. Belarusaj terpomflan(et)oj “dranikoj”.....	121
Stanislav Belov. Ridu kune ni!.....	123
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....	124
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	125
Reklamo.....	126

**Kovropaĝa foto:** Vytautas Grubliauskas, la urbestro de Klajpedo kaj muzikisto, akceptis esti Alta Protektanto de la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), kiuj okazos la 9-17an de julio 2022 en Klajpedo. Aliĝu jam nun! (*Foto de la Klajpeda urba municipa estraro*)

# Eventoj



La septembran *Ondon* dum pluraj jaroj plenigis artikoloj pri someraj kaj fruaŭtunaj kongresoj kaj renkontiĝoj, sed ĉi-jare nur malmultaj el ili okazis nevirtuale. En la sekvaj paĝoj vi povos legi pri kelkaj el ĉi tiuj malmultaj, sed la virtualaĵoj (VK, IJK, SES kaj aliaj) restas ekster nia atento, ja ĉiu deziranto havis la eblon ilin spekti kaj/aŭ partopreni rete.

Foto: Post kelkaj minutoj la lastaj partoprenantoj forlasos la ĵurnalistan seminarion en Aukštadvaris; vd. p. 22-23. (Foto: *Gražvydas Jurgelevičius*)

# La 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj



Litova Esperanto-Asocio (LEA) invitas al la tradiciaj 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), kiuj okazos la 9–17an de julio 2022 en Klajpedo (Klaipėda, Litovio). BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio. BET-56 estas dediĉita al la 770-jariĝo de Klajpedo.

**Klajpedo**, fondita en 1252, estas havenurbo ĉe la Balta Maro, je 300 km okcidente de la Litovia ĉefurbo Vilno. Ĝi estas la tria laŭ la grandeco urbo de Litovio (post Vilno kaj Kaŭno), grava industria kaj kultura centro. Nun la urbo havas ĉirkaŭ 150 mil loĝantojn.

**Loko:** Ĉiuj programeroj de BET-56 okazos en la bonege ekipita Klajpeda universitato (str. H. Manto 84). La universitato situas en la centro de la urbo. Ĝi estas libere kaj facile atingebla buse kaj aŭtomobile.

La BETanoj havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. Ni povos uzi la tutan infrastrukturon de la universitato (kunsidejoj, salonoj, studentaj domoj, botanika ĝardeno, universitata kafejo, komputiloj, alia tekniko ktp). La universitato havas du ŝipojn “Brabander” kaj “Odisėja”, kiujn eblos uzi por duontagaj ekskursoj en la maro.

BET-56 havos subtenon kaj helpon de la urbaj instancoj de Klajpedo kaj de la tutlandaj ŝtataj instancoj.

**La programo** estos tradicia: somera universitato, diversnivela Esperanto-kurso, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri la Esperanto-movado en la Baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, konatiĝo kun la litovaj lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero.

La Organiza Komitato atendas proponojn, sugestojn, ofertojn por la programo, ankaŭ sinproponojn.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, speciale el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj landoj. La kvanto de la partoprenantoj ne estas limigita. Ni atendas 500 personojn el 30-40 landoj.

## ALIĜKOTIZO

Ĝis la 31a de decembro 2021:

50 eŭroj por esperantistoj el ekssovietuniaj kaj ekssocialismaj Eŭropaj landoj;

70 eŭroj por esperantistoj el ĉiuj ceteraj landoj.

Ekde la 1a de januaro 2022 la aliĝkotizo por ambaŭ aliĝkategorioj kreskos je 10 eŭroj, respektive, ĝis 60 kaj 80 eŭroj.

La kotizo pageblas en ajna konvertebla valuto.  
Infanoj, lernantoj kaj studentoj aliĝkotizon ne pagas.

## ALIĜADO

Por aliĝi necesas plenigi la aliĝilon kaj sendi ĝin al Litova Esperanto-Asocio (p. k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio) aŭ rete (litova.ea@mail.lt). La paperaj aliĝiloj riceveblas ĉe LEA kaj estas elŝuteblaj rete ĉe <https://mallonge.net/gn>.

Reta aliĝilo: <https://mallonge.net/gl>

Samtempe bonvolu pagi vian aliĝkotizon.

**Grave!** Personoj, kiuj grave kontribuos al la programo aŭ/kaj signife helpos organize, ne pagos la aliĝkotizon.

## PAGEBLECOJ

1) sendi poŝte/ĝire al la konto de la kasistino de BET-56 Irena Jagminaitė: LT687300010157748186 en SWEDBANK, SWIFT kodo HABALT22XXX;

2) pagi per kontanta mono dum esperantistaj aranĝoj al Irena Jagminaitė kaj al aliaj organizantoj de BET-56;

3) interkonsenti kun la Organiza Komitato pri alia pagmaniero;

4) esceptokaze, kun konsento de la Organiza Komitato, pagi surloke ĉe la alveno al BET-56, se ne eblas anticipa pago.

La aliĝkotizo ne estas repagebla. Aliĝo sen pago de la kotizo ne validas (krom speciale interkonsentitaj kazoj).

## VIZOJ

Al Litovio senvize rajtas veni la civitanoj de ĉiuj landoj de Eŭropa Unio kaj de multaj aliaj landoj. Aliaj petu vizojn ĉe Litoviaj ambasadejoj kaj konsulejoj en diversaj landoj. En problemaj kazoj turnu vin al LEA, kiu sendos oficialan inviton.

## LOĜADO

La partoprenantoj de BET-56 povos loĝi en:

1. Studenta domo de la universitato (Universiteto al. 12) situanta en la universitata urbeto mem. En unulita ĉambro (limigita kvanto): 35 eŭroj tagnokte; lito en dulita ĉambro: 30 eŭroj tagnokte. Necesejoj kaj lavuoj estas apud la ĉambroj. Duŝejo estas por du aŭ kvar personoj.

2. En studenta domo de la universitato (av. Statybininkų 43) iom for de la urbo-centro. Lito en dulita kaj trilita ĉambro: 20 eŭroj. Necesejoj kaj lavuoj estas apud ĉambroj. Duŝejo estas komunaj por la tuta etaĝo.

3. En studenta domo de Litovia supera marista lernejo (str. Karklų 2) apud la universitato. Lito en dulita kaj trilita ĉambro: 20 eŭroj. Necesejoj, lavuoj kaj duŝejoj estas apud la ĉambroj.

Se tiuj studentaj domoj ne sufiĉos, la Organiza komitato rezervos pliajn ĉambrojn

en studentaj domoj de Ŝtata kolegio de Klajpedo, Turisma lernejo de Klajpedo, Klajpeda instrua centro k.a. La kondiĉoj kaj prezoj estas similaj.

Oni povas loĝi ankaŭ en diversnivelaĵ kaj diversprezaj hoteloj kaj gastejoj de la urbo. Mendu memstare. Vidu la liston de la hoteloj kaj gastejoj ĉe <https://klaipeda-travel.lt/nakvyne/>. La informoj estas en la litova, angla, germana kaj rusa lingvoj.

Pagu la loĝadon same kiel la aliĝkotizon, laŭeble frue; nur esceptokaze eblas pagi surloke ĉe la registrado.

## **MANĜADO**

En la universitata kafejo *Jogundė*. Oni servos modestan matenmanĝon kaj normalan tagmanĝon. La unutaga prezo de ambaŭ estas 10 eŭroj (3 eŭroj matenmanĝo kaj 7 eŭroj tagmanĝo). Eblis elekti vegetaran manĝon. Vespermanĝon ĉiu aranĝu memstare laŭ sia plaĉo. Pagu la manĝadon same kiel la aliĝkotizon, laŭeble frue, nur esceptokaze eblas pagi surloke ĉe la registrado.

Komence de junio 2022 aperos Informilo №2 kun pli detalaj kaj aktualaj informoj. Ni planas eldonon de ĉiutaga gazeto dum la tuta periodo de la aranĝo.

Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por ke BET-56 estu programe kaj organize altnivela internacia esperantista aranĝo. Bonvolu jam nun plani vian partoprenon en la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj kaj notu tiujn datojn en via Esperanto-kalendaro. Ĉiuj estas petataj disvastigi informojn pri BET-56 tra la tuta mondo.

## **UTILAJ RETEJOJ**

BET-56 ĉe LEA: <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56>

BET en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*: <https://sezonoj.ru/bet>

BET-56 en Facebook: <https://www.facebook.com/events/515974583016709>

Turismaj informoj (litove, angle, germane, ruse): <https://klaipedatravel.lt>

Urba mapo: <https://klaipedatravel.lt/en/map>

Vikipedio pri Klajpedo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Klaip%C4%97da>

## **KONTAKTOJ DE LEA**

Poŝta adreso: Litova Esperanto-Asocio p. k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio.

Poŝtelefonoj: +370-687-12219 (Povilas Jegorovas); +370-611-60402 (Asta Nastaravičiūtė).

Retadreso: LEA: [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt); Prezidanto de LEA Povilas Jegorovas: [pje-gorovas@yahoo.com](mailto:pjegorovas@yahoo.com); Respondeca sekretario de LEA, Asta Nastaravičiūtė: [ana-sturte@gmail.com](mailto:ana-sturte@gmail.com).

***Bonvenon al Litovio!***

**Organiza Komitato**





## La urbestro de Klajpedo – Alta Protektanto de BET-56

La urbestro de Klajpedo **Vytautas Grubliauskas** akceptis la proponon de Litova Esperanto-Asocio kaj konsentis esti Alta Protektanto de la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), kiuj okazos la 9-17an de julio 2022 en Klajpedo.

Vytautas Grubliauskas havas kulturalan edukon, kio estas malofta fenomeno por politikistoj. Lian tutan vivon akompanas muziko. Vytautas Grubliauskas naskiĝis en 1956 en Klajpedo, kaj dum 1963-75 li frekventis mezlernejon, kaj samtempe ankaŭ specialan muzikan lernejon kaj dum sep jaroj kantis en la knaba koruso *Gintarėlis*. En 1975 li studentiĝis en la Klajpeda fakultato de Litovia Ŝtata Konservatorio kaj en 1980 diplomiĝis kiel orkestrestro kaj solisto.

Dum 1980-82 li servis en la Sovetunia armeo kiel solisto de orkestro kaj akompanisto en Rigo. Dum 1982-84 li laboris kiel muzikisto en la ensemblo *Nerija* de la Litovia filharmonio. En 1984 li eklaboris en la Klajpeda fakultato de Litovia Ŝtata Konservatorio kiel lekciisto kaj koncertmajstro. Li ofte partoprenis en elsendoj de Litovia Radio kaj Televido, koncertis en multaj landoj, partoprenis en internaciaj ĵazfestivaloj. Ekde 1994 li estis estro de la katedro pri estrada (tradicia Sovetunia termino por popmuziko kaj aliaj “leĝeraj” artaj ĝenroj) muziko. Krome, en 1993 li fariĝis gvidanto de Klajpeda diksilanda ĵazorkestro. Li koncertis en prestiĝaj festivaloj en Usono, Germanio, Nederlando, Svedio, Svislando, Finnlando, Britio, Pollando, Latvio, Ruslando.

Ekde 1994 ĝis 2004 Grubliauskas estis organizanto kaj reĝisoro de la internaciaj ĵazfestivaloj en Klajpedo, kiujn li mem partoprenis. Krome, de 1984 ĝis 2003 li estis solisto de Klajpeda blovorkestro.

En 1996 li fondis ĵazklubon en Klajpedo kaj ĝis 2004 estis ĝia prezidanto. En 1997 li estis elektita kiel la plej populara homo de kulturo kaj arto en Klajpedo. En 2000 li iĝis docento en la Klajpeda universitato. En 2005 li ricevis la honoran titolon “Magistro pri kulturo de Klajpedo”.

En 2000 komenciĝis lia aktiva politika agado. Li elektiĝis en la konsilantaron de Klajpedo. En 2004 li estis elektita membro de la Litovia parlamento (Sejmo) kaj en 2008 reelektita por la dua kvarjara periodo. En 2011 li estis elektita urbestro de Klajpedo, en 2015 reelektita por la dua periodo kaj en 2019 reelektita por la tria periodo.

Li estas edziĝinta, patro de kvin infanoj.

En 2015 Vytautas Grubliauskas ricevis la Ordenon de la Polusa Stelo (Nordstjärneorden, Svedio). En 2017 la ministerio de kulturo de Francio atribuis al li la Ordenon pri Arto kaj Literaturo (L'Ordre des Arts et des Lettres). En 2018 li ricevis la Ordenon de la Leviĝanta Suno (Japanio).

Kaj fine. Dum la renkontiĝo kun la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio la urbestro rakontis, ke en sia junaĝo li iom lernis Esperanton kaj demonstris la konon de kelkaj vortoj en Esperanto. Do, sendube, dum la inaŭguro de la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj li almenaŭ parte parolos en Esperanto.

**Povilas Jegorovas**

## **UEA donis sian aŭspicion al BET-56**

La Estraro de la Universala Esperanto-Asocio donis sian aŭspicion al BET-56, kiu okazos venontsomere en Klajpedo. BET-56 estas dediĉata al la 770-jariĝo de Klajpedo kaj al la 135-jariĝo de Esperanto. Per tio UEA esprimas sian apogon al grava internacia aranĝo, kies okazigo konsiderinde servas la celojn de la Asocio.

La aŭspicio de UEA estas kvazaŭ signo de kvalito de la aŭspiciata aranĝo. Per sia aŭspicio UEA agnoskas, ke la aranĝo estas prestiĝa kaj altnivela. Kutime estas aŭspiciataj nur la internaciaj esperantistaj aranĝoj kun longa tradicio.

Karakteriza estas la opinio pri BET de la estrarano de UEA pri kulturo kaj kongresoj Orlando E. Raola: “Kiel partopreninto en la lasta okazo kiam BET okazis ĉeeste (BET-55, Panevėžys, 2019), mi plej forte subtenas la proponon aŭspicii tiun ĉi aranĝon. Ĝi estis tiam ege bone organizita, la programo estis riĉega kaj tre varia, kaj ĝenerale la etoso kreita estis unu el la plej aŭtentike Esperantaj kiujn mi partoprenis dum pli ol 35 jaroj da esperantumado”. UEA ankaŭ pretas helpi reklami BET-56 laŭ siaj informkanaloj.

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# 14 elstaraj agantoj diplomitaj dum la 2a Virtuala Kongreso de Esperanto

En la Fermo de la 2a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) estis anoncitaj 14 ricevantoj de la Diplomoj pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado, aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.



## Diplomo pri Elstara Agado

**Petro Baláž, Dorota Rodzianko kaj la teamo de E@I** (Slovakio) pro la elstara agado en organizado de aranĝoj kaj projektoj, inter ili KAEST (ekde 2010), SES, SEP, Poliglota Kunveno (ekde 2017), mallonge.net, kaj pro la teknika realigo de diversaj Esperanto-eventoj dum la pandemio, inter ili la Monda Festivalo de Esperanto, VK de UEA, IJK (2020) de TEJO kaj VEKI de ILEI;

2<sup>a</sup> VIRTUALA KONGRESO  
DE ESPERANTO

17-24 de JULIO 2021

**Marija Belošević** (Kroatio) pro la elstara agado kiel organizanto, ekde 2013, de la Tagoj de Lernado dum la Universala Kongreso kaj, en 2020 kaj 2021, dum la VK;

**Elysée Byelongo** (Sud-Afriko) pro la elstara agado kiel unua afrika esperantisto, kies doktoriĝa tezo havas sekcion pri Esperanto, kaj kiel kreinto de Esperanto-kluboj en Nairobo, Zimbabvo kaj Tanzanio, inter ili la Klubo de Paco kaj Frateco, kadre de kiu li instruis la lingvon al centoj da rifuĝintoj en la Tendaro Nyarugusu, inter 1996 kaj 1998;

**Eva Fitzelová kaj Johannes Mueller** (Germanio) pro la elstara agado kiel kreintoj kaj prizorgantoj de la podkasto kern.punkto.info;

**Irana Esperanto-Asocio** pro la elstara agado kiel organizanto kaj gastiganto de multaj retaj eventoj, aparte ekde la komenco de la pandemio, inter ili la 7a Irana Esperanto-Kongreso, la unua virtuala kongreso en Esperantujo, en aprilo 2020, kaj la kursaro Tibor Sekelj;

**Kolombia Esperanto-Ligo** pro la elstara agado pri la reta instruado de lingvoj dum la pandemio, inter ili la kursoj pri latinidaj lingvoj per Esperanto kaj du furoraj eldonoj de la Esperanto-kurso por hispanparolantoj, en 2020 kaj 2021, kun sume pli ol 1000 aliĝintoj;

**Luis Obando** (Kolombio) pro la elstara agado interalie kiel reviviginto kaj prizorganto de la jutuba kanalo UEAviva kaj de la voĉlegita versio de la revuoj *Esperanto* kaj *Monato*;

**Rafael Lima** (Brazilo) pro la elstara agado kiel kreinto kaj prizorganto de la retejo de UEA "UN Esperante" kaj ĝiaj profiloj en sociaj retoj;

**Suzuki Keiichiro** (Japanio) pro la elstara agado kiel plenuminto de 4 periodoj kiel prezidanto de Japana Esperanto-Instituto (JEI), dum 8 jaroj kaj okaze de la 100-jara jubileo de JEI;

**Wu Guojiang** (Ĉinio) pro la longtempa elstara agado kiel gvidinto de la projekto Ĝemelaj Urboj kaj gvidanto de la Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo.

### Diplomo pri Elstara Arta Agado

**Amir Naor** (Israelo), plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA, pro la elstara kontribuo al la Esperanto-kulturo kiel verkisto, tradukisto de literaturo kaj kantoj kaj kiel kreinto kaj kunordiganto de la retejo verkoj.com;

**Anna Striganova** (Rusio) pro la elstara kontribuo al la Esperanto-kulturo kiel eldonisto, ilustristo, fabel-verkisto, pup-faristo kaj fotisto, interalie pro la lastatempa malavara donaco de multaj el siaj fotoj al Vikimedia;

**Eterne Rima** (Pollando/Japanio) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo kiel pioniro de la esperantista hiphopa kaj repa muziko;

**Paulo Sérgio Viana** (Brazilo), plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj, pro la elstara kontribuo al la Esperanto-kulturo kiel tradukisto, eldonisto, recenzisto kaj kontribuanto de *Beletra Almanako* kaj Esperanta Retradio.

GK UEA

## Nova membro de la Honora Patrona Komitato de UEA



Dum la fermo de la 2a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 24an de julio 2021, estis anoncita la akcepto de nova membro en la Honora Patrona Komitato de UEA: Prof. Marco Lucchesi, elektita de la Komitato de UEA en la unua sesio de la Ĝenerala Kunveno de 2021, okazinta samtage.

Marco Americo Lucchesi estas brazila verkisto, profesoro de la Federacia Universitato de Rio-de-Ĵanejro kaj la nuntempa prezidanto de Brazila Beletristika Akademio, unu el plej respektataj institucioj de Brazilo. Li estis akceptita en tiu akademio en 2011, kaj ekde 2018 li estas ĝia prezidanto. Li havas vastan konon pri pli ol 20 lingvoj kaj eĉ kreis artefaritan lingvon nomatan Laputar, prezentitan per la verko *Bazati dir*

*Härstä Laputar* (Rudimentoj de la lingvo Laputar, 2015).

Li havas verkaĵojn kiel poeto, romanisto, memoraĵisto, eseisto, tradukisto kaj eldonisto kaj ricevis multajn gravajn premiojn, ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en Eŭropo, aparte en Italio kaj Rumanio, kun kiuj li havas fortajn ligojn. Li estas konata pro sia defendo de indiĝenaj lingvoj kaj homaj rajtoj, kaj sub lia gvido konstante okazas edukaj kaj literaturaj projektoj en malriĉaj kvartaloj kaj en prizonoj. Pri li Umberto Eco diris: "Lia intensa, kreiva laboro rezultigis verkaron belegan".

Lucchesi akceptis la inviton de brazilaj esperantistoj malfermi la 31an Esperanto-Renkontiĝon de la Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, kiu okazis virtuale en la 21a de majo

2021, okaze de la Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo. La evento estis organizita de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro (AERĴ), federita asocio de Brazila Esperanto-Ligo (BEL), landa asocio de UEA. Lia parolado estis publikigita en la julia-aŭgusta numero de la revuo *Esperanto*, sur kies kovrilo li aperas.

Lucchesi lernis Esperanton dum sia junaĝo (li naskiĝis la 9an de decembro 1963) kaj publike subtenas nian lingvon. La 3an de januaro 2018 li publikigis artikolon pri Esperanto en *O Globo*, unu el la plej gravaj ĵurnaloj de Brazilo, sub la titolo (en Esperanto) "Verda Stelo". Lia libro en Esperanto *Alivorte*, estos baldaŭ publikigita. Li estis proponita al la Honora Patrona Komitato de UEA de ok landaj asocioj, de la Estraro de UEA kaj de aliaj 13 komitatanoj reprezentantaj 13 regnojn (entute 21 komitatanoj el 19 regnoj) kaj akceptita de la Komitato de UEA.

GK UEA

## La Premio Deguĉi 2021 al Stefan MacGill



La Premion Onisaburo Deguĉi UEA starigis en la Jubilea Jaro 1987. Ĝi distingas meritajn agantojn, kiuj longtempe laboras per Esperanto, por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de D-ro Zamenhof kaj la instruoj de Onisaburo Deguĉi. Spegule al la ideoj de Zamenhof kaj Deguĉi, la premio celas honori tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de UEA. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo de 1000 eŭroj kaj estiĝis de fonduso proponita kaj starigita de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA), faka organizaĵo en kunlaboraj rilatoj kun UEA.

Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Deguĉi de la jaro 2021 estas aljuĝita al **Stefan MacGill**.

Stefan Clive MacGill naskiĝis la 5an de oktobro 1948 en Nov-Zelando, tamen ekde 1986 li vivas en Hungario. Stefan lernis Esperanton denaske de sia patro, David MacGill, kiu instigis al sia patrino eklerni la lingvon. Liaj tri filinoj parolas Esperanton; do temas pri kvar-generacia esperantisteco en la familio.

Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

## Bjalistoko daŭre aktivas

Malgraŭ la koronavirusa epidemio, la varia Esperanta akt ivado daŭras – reale kaj virtuale — en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof.

Fine de junio Bjalistoka Esperanto-Societo (BES) estis unu el la partneroj en la projekto “Trejnado por Trejnistoj” (TTT2), realigita kun financa subteno de Eŭropa Komisiono. La renkontiĝo okazis en la Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo. Kvar esperantistoj el Bjalistoko partoprenis la trejnadon por fariĝi trejnistoj. La 7an de julio en la Bjalistoka klubejo okazis kunveno en kiu la partoprenintoj de la trejnado rakontis pri ĝi. — <https://mallonge.net/hh>.

En junio, unu jaron post la eldono de la pollingva libro *Kun Dipatrino sur biciklo. Vojaĝo al miraklaj bildoj, ikonoj kaj sanktaj fontoj de Podlaĥio* de Wojciech Koronkiewicz, BES aperigis Esperantan tradukon de ĉi tiu gvidlibro. La 12an de julio Wojciech Koronkiewicz prezentis la Esperantan eldonon de sia libro — <https://mallonge.net/hi>.

Je la sama tago, la 12an de julio, okaze de la 80a datreveno de la tragedia morto de Jakobo Ŝapiro, la iniciatinto kaj la unua prezidanto de la Esperanto-societo en Bjalistoko, bjalistokaj esperantistoj kune omaĝis lin ĉe lia iama domo.

Bjalistoko: Przemysław Wierzbowski, Wojciech Koronkiewicz kaj Elżbieta Karczewska post la prezentado de la Esperanta eldono de *Kun Dipatrino sur biciklo*. (Foto: BES)



BES kaj Sennacieca Asocio Tutmonda estis la kunorganizantoj de la 94a kongreso de SAT, kiu estis planita por pasintjara somero, sed okazis nur la 23-26an de julio 2021. La plej multaj virtualaj prelegoj okazis ĉirkaŭ semajnfino: tiel, tiuj kiuj pretis kaj rajtis vojaĝi tra Eŭropo kaj ĝis Bjalistoko havis la eblon ekskursi surloke. La programo enhavis prelegojn, ekzemple, pri la centjariĝo de la Portugala Komunista Partio aŭ pri Vasco Gonçalves kaj la revolucia procezo en Portugalio post 1974. Sed la kongreso estis ankaŭ oportuna okazo por prezenti la novan eldonon de *Vojaĝo al Kazohinio* de Sándor Szathmári, kiu estas rezulto de la kunlaboro inter BES kaj SAT. Kelkaj programeroj okazis kadre de la samtempa Virtuala Kongreso de UEA.

La 7-14an de aŭgusto tri BESanoj partoprenis la Kristanan Esperanto-Kongreson en Legnica. La 20an de septembro en vica kluba renkontiĝo la partoprenintoj resumis la kongreson — <https://mallonge.net/hj>.

Ekde 2020 BES kunordigas la projekton “Reta Edukado Nun” de la programo Erasmus+. La unua renkontiĝo okazis la 12-16an de aŭgusto en Đurđevac (Kroatio), kaj ĝi estis organizita de Dokumenta Esperanto-Centro. La partoprenantoj de kvin organizoj el Britio, Francio, Italio, Kroatio kaj Pollando lernis kune pri pretigado de ciferecaj dokumentoj, efika arkivigado kaj bonkvalita libroeldonado. La tri bjalistokanoj, partoprenintaj la renkontiĝon, la 30an de aŭgusto rakontis pri ĝi en la klubejo — <https://mallonge.net/hk>.

La 2an de septembro BES bonvenigis Jeanne Grimaud, novan volontulinon el Francio, kiu venis danke al la partnereco kun Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo. Dum kvin monatoj ŝi helpas la agadon de la Bjalistoka societo.

La sekva renkontiĝo kadre de la projekto “Trejnado por Trejnistoj” (TTT2) okazis la 3-5an de septembro en Kopenhago. Tri bjalistokanoj tie lernis krei varbfilmojn kaj klare transdoni mesaĝojn — <https://mallonge.net/hl>.

Kadre de la Nacia Legado (kampanjo por disvastigi kaj popularigi polan nacian literaturon) la dramo *La moralo de sinjorino Dulaska* de Gabriela Zapolska estis esperantigita de Tomasz Chmielik kaj Lidia Ligęza kaj eldonita fare de BES kunlaboro kun Podlańia Libraro Łukasz Górnicki. La 4an de septembro en la Centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko oni prezentis la vivon kaj verkojn de la aŭtorino, poste membroj de la societo aktorin ludante la rolojn el la dramo — <https://mallonge.net/hm>.

La 12an de septembro okazis la premiera prezento de la romano *Solaris* de Stanisław Lem (1921-2006) en Esperanto. Przemysław Wierzbowski, kiu tradukis ĝin, parolis pri siaj spertoj dum la tradukado, pri lingvaj kaj sciencfikciaj defioj. Poste kelkaj esperantistoj legis fragmentojn de la libro. En la Centro Zamenhof, kie okazis la renkontiĝo, oni povis vidi ekspozicion kun kelkdek diverslingvaj eldonoj de *Solaris*, kolektitaj danke al helpo de eksterlandaj esperantistoj — <https://mallonge.net/hn>.

**Jeanne Grimaud**



Nova E-societo en Klajpedo (Foto: Nijolė Požarskienė)

## Litovia mozaiko

### **Klajpedaj esperantistoj prepariĝas por BET-56**

Fine de la 20a jarcento en Klajpedo funkciis forta urba Esperanto-klubo, sed komence de la 21a jarcento la klubo iom post iom estingiĝis. Tamen multaj esperantistoj restis en la urbo. Nun, renkonte al la 56a BET, kiu okazos en Klajpedo somere 2022, reaperis la bezono unuigi kaj aktivigi ĉiujn urbajn esperantistojn. Tial laŭ la iniciato kaj kun organiza helpo de Litova Esperanto-Asocio en la konferenca salono de la urba hotelo *Naval* la 18an de aŭgusto okazis fonda kunveno de Esperanto-Societo de Klajpedo kun partopreno de 14 esperantistoj.

La kunvenon gvidis la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas, sekretariis Nijolė Požarskienė. La kunveno unuanime decidis fondi Esperanto-societon kaj konfirmis ĝian statuton. Kiel la prezidanto de la societo estis elektita Vilmantas Jakštas. En la tripersona estraro krome estas Arūnas Kazlauskas kaj Palmira Milašienė. La prezidanto de la societo estis rajtigita registri la societon en ŝtataj instancoj.

Fine de la kunveno oni diskutis la organizajn aferojn de la sekvontjara BET. Ĉiuj partoprenantoj aliĝis al BET-56.

### **Nova respondeca sekretario de LEA**

Ekde la 12a de julio 2021 nia Kaŭna koleginino Asta Nastaravičiūtė estas nova respondeca sekretario de Litova Esperanto-Asocio. Ŝi esperantistiĝis en 1997, aktivas en Kaŭno.



Asta Nastaravičiūtė partoprenis kaj kunorganizis kelkajn BETojn, internacian katolikan esperantistan kongreson en Kretinga (2004) kaj la 90an Universalan Kongreson de Esperanto en Vilno (2005).

Ŝi finis Medicinan universitaton en Kaŭno kaj profesie laboras kiel administranto pri flegado en hospitaloj de Kaŭno. Ŝia poŝtelefono por kontaktoj estas +370 611 60402, retadreso estas atsanast@gmail.com. Dum la labortagoj telefonu nur post la 16a horo. La kongreso de LEA en decembro devos konfirmi ŝin en ĉi tiu posteno.

## LEA kongresos en decembro

Litova Esperanto-Asocio informas, ke la 56a kongreso de LEA okazos la 11an de decembro 2021 en Kaŭno. Samloke post la kongreso la 11-12an de decembro okazos la tradiciaj Zamenhof-Tagoj 2021. Pli detalaj informoj pri ambaŭ aranĝoj baldaŭ aperos en la retejo de LEA kaj en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto.

Povilas Jegorovas

## Malgraŭ la pandemio kaj malbona vetero

“Trans fenetro nia pluvaj gutoj ploras”, – estas vortoj el la malnova litova kanto *Aŭtuno (venas)*. Kvazaŭ ilustre, ankaŭ la 18-19an de septembro la ĉielo tristis, estis griza; pluvetis. Preskaŭ senĉese la ekstera “varmo” ne kapablis superi la sesgradan nivelon. Tamen ni ne mornis – ni okazigis la jam 14an Seminarion-Kampadejon de Esperantistaj Ĵurnalistoj.

La tradicia seminario okazis en la tradicia loko – ĉe la mezlitovia urbeto Aukštadvaris (Aŭkštadvaro = Supra kortego). La koronavirusa situacio en Litovio ne pliboniĝis, sed ni profitis la bonan konsilon: se vi ne povas ŝanĝi la cirkonstancon, ŝanĝu vian rilaton al ĝi. Ni do akceptis por la partoprenado nur vakcinitojn kun Eblec-Pasportoj, atestantaj pri vakcinado aŭ saniĝo. Rezulte kunvenis nur 25-opo kontraŭ kutima pli ol 30-persona rondo. Tamen ni komunikis sen kutimaj, diverse-loke devigaj sanmaskoj!

La seminaria programo titole similis al la pasinjaraj, sed enhance ĝi diferencis. Mi kaptis la okazon kaj prelegis la unua bildekskurse: pri la unua esperantista ĵurnalista Lazaro Zamenhof kaj lia veno al Vilno, pri la unuaj cartempaj vilnaj esperantistoj, pri sovetuniaj vilnaj revivigantoj de la litova Esperanto-agado. Mi mense haltis ĉe la konstruaĵo, kie estis surbendigitaj kantoj por la unua litovia kaj sovetunia sondisko (Vilna Filharmonio), ĉe la Urbodomo, kie en 2008 estis restarigita TEĴA.

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

## Renkontiĝo de Amikoj revenis al Altajo

La 15a Renkontiĝo de Amikoj (RA-15) okazis la 3-11an de aŭgusto en Altaja regiono, kiu gastigis la renkontiĝon en 2014 kaj 2017. Ĉi tiu regiono estas nekredeble pitoreska kaj diversnatura. Vojaĝante tra ĝi, oni povas renkonti montojn kaj valojn, vastajn kampojn kaj lagojn. Ĉi-foje RA estis okazigita apud la granda lago Jarovoje, proksime al la Ruslanda-Kazaĥstana limo.

Ĉi tiu parto de Altaja regiono estas stepa kun multaj salaj lagoj, kaj ni loĝis apud unu el tiaj lagoj kaj krom partopreni la Esperanto-programon, la RAanoj ĝuis la naĝadon kaj plaĝumadon. Ne mankis ekskursoj. Unu ekskurso okazis al germana vilaĝo, kie ni konatiĝis kun kulturo de luteranoj, kiuj sukcesis konservi siajn tradiciojn. Ni vizitis ankaŭ alian salan lagon, kiu havas teneran rozan koloron, kaj vidis akiradon de salo. Ĉi tiu metio funkcias de la tempo de Katerina la Granda. Imagu: fervojaj reloĵoj en la lago, kaj trajno veturas tien kaj reen tra rozkolora spaco de la lago. Oni sentas sin kvazaŭ en alia planedo.

Kiel kutime en la programo de la Renkontiĝo de Amikoj okazis konversaciaj rondoj kaj temaj vesperoj, kvizoj, konkursoj. La ĉefa temo de la renkontiĝo estis kosmo,



ĉar Altaĵo havas rilaton al ĝi. Unue, proksime de ĝi estas Bajkonur, de kie startas kosmoŝipoj. Due, German Titov, la dua kosmonaŭto en la mondo, naskiĝis en Altaĵa regiono. Trie, la unua virino-kosmonaŭto, Valentina Tereŝkova, neatendite surteriĝis en Altaĵa regiono, apud la vilaĝo Bajevo, kie nuntempe staras monumento al ŝi.

Ĉiu tago de RA estis dediĉita al iu planedo. Dum la tago de Suno ni havis metitejon kaj faris leontodojn. Leontodo ja estas malgranda Suno sur la tero. Vendrede, dum la Venusa tago okazis konkurso de Venusoj-diinoj. La plej gaja estis la festo de Neptuno. Dum la poezia vespero ni legis niajn ŝatatajn versojn, ekzemple, kvinjara knabino el Barnaulo parkere brile legis la fablon *Libelo kaj Formiko*.

Entute partoprenis 39 personoj el 12 loĝlokoj. La plej grandaj grupoj venis el Krasnojarsko kaj Novosibirsko. Ni bone pasigis la tempon kaj bone komuniĝis. Vespere ni ludis diversajn tablajn ludojn kaj babilis. RA-15, laŭ mi, estis sukcesa, ĉar ĝi allogis gastojn eĉ el foraj lokoj: Moskvo, Sankt-Peterburgo, Tiĥvino, Novoĉerkasko.

La 16a Renkontiĝo de Amikoj estas planata okcidente de Ruslando – en Kaliningrado. Ĝi komenciĝos la 17an de julio 2020, tuj post la fino de la 56a BET en Klajpedo, kaj daŭros ĝis la 24a de julio.

**Katerina Arbekova**

## **Nova konsisto de la organoj de REU**

La 21-22an de aŭgusto 2021 en la sanatorio «Kaspj» en Dagestano pasis la 31a Konferenco de Rusia Esperantista Unio. La Konferenco de REU daŭrigis la funkcion de la nuna Estraro de la Unio kun kelkaj ŝanĝoj:

– Estas elektita nova estrarano, Abduraĥman Junusov, kiu okupiĝos pri amas-komunikiloj / eksteraj rilatoj;

– Jelena Nadikova iĝis komisiito pri kreo de ILEI-sekcio en Rusio;

– Viktoro Aroloviĉ, kiu en la pasinta oficperiodo estis komisiito pri dokumentado, lasas tiun postenon pro la aĝo kaj okupiteco pri profesiaj aferoj. La Konferenco dankas Viktoron pro bona multjara laboro en diversaj postenoj en REU.

– En la Kontrol-revizia komisiono ne plu restos Sergeo Ĵilejkin.

Do, jen la nova konsisto de la organoj de REU.

**La Estraro:** Aleksandr Lebedev (Kovrov/Ivanovo, prezidanto), Svetlana Smetanina (Moskvo, 1a vicprezidanto), Nikolaj Gudskov (Moskvo, 2a vicprezidanto), Irina Gonĉarova (Odincovo, estrarano), Aleksandr Mitin (Niĵnij Novgorod, estrarano), Abduraĥman Junusov (Maĥaĉkala, estrarano).

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# György Nanovfszky forpasis

La 10an de aŭgusto 2021 en Budapeŝto forpasis

**György Nanovfszky (1942-2021),**

hungara filologo, ĵurnalisto, verkisto, diplomato (ambasadoro de Hungario en Ruslando dum 1992-98 kaj en Singapuro dum 2001-05, ĝenerala direktoro en la ministerio pri eksteraj aferoj de Hungario 1998-2001), socia aganto (prezidanto de Asocio de Hungaraj Tradukistoj kaj Interpretistoj, 1991-93; membro de direktora konsilio de Asocio de Tutmondaj Centroj de Komercoj WTCA, 1992-2008), reprezentanto de Hungario en la kongresoj de finnugraj popoloj, membro de la Finnugra Akademio de Sciencoj (Sankt-Peterburgo, 1998-2021), aŭtoro de 15 libroj kaj de multaj artikoloj en la hungara, rusa, pola kaj angla lingvoj. Nanovfszky ricevis kelkajn Hungariajn ordenojn kaj medalojn kaj la medalon de Patriotismo en Turkmenistano.



Lerninte Esperanton en 1958 en kursoj de J. Baghy kaj A. Pechan, li tuj aktiviĝis movade kiel prezidanto de Esperanto-Klubo Studenta en Budapeŝto (1958-60), kunorganizanto de la 51a IFEF-kongreso (Budapeŝto, 1962); en 1963-68 li aktivis en la Moskva Esperanto-klubo *Fajrero*, vizitis (re)naskiĝintajn Esperanto-klubojn en Siberio, Kaŭkazo kaj Leningrado. Nanovfszky estis reprezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo (1982-86), prezidanto de HEA kaj ties komitatano A en UEA (1998-2006), membro (de 1997) kaj orda profesoro (1998) de AIS, kortumano de la Esperanta Civito (de 2013), vicprezidanto de la Esperanta PEN-Centro (de 2013), ĉefredaktoro de *Planlingvistiko* (1982-86), redakciano de *Hungara Vivo* (1988-90) kaj *Literatura Foiro* (1986), prezidanto de la societo Fajsz Amika Rondo kaj gvidanto de ties monataj kunvenoj "Literaturaj kafejoj" (2012-21). Li ofte menciis Esperanton okaze de alitemaj intervjuoj.

Kiel ambasadoro de Hungario en Moskvo Nanovfszky helpis esperantistojn, interalie, per akcepto en la ambasadejo okaze de la Zamenhof-Tagoj; kiel ambasadoro en Singapuro li aktivigis lokajn esperantistojn, organizante regulajn renkontiĝojn. En 2015 intervjuoj kun li, kiujn faris I. Nemere, aperis libroforme kun la titolo *Nano. Aventuroj de poliglota diplomato en kvin kontinentoj*.

Pro sia Esperanta aktivado li estis elektita honora prezidanto de HEA (2007) kaj honora membro de UEA (2012).

*Ni funebras pro la forpaso de la eminenta esperantisto György Nanovfszky kaj kondolencas al liaj parencoj kaj proksimuloj.*

**Halina Gorecka  
Aleksander Korjenkov**

# Tribuno



Unu el la Klajpedaj monumentoj, skulptitaj de Arūnas Sakalauskas, omaĝas al Vydūnas. Ĉi tiun pseŭdonimon elektis Wilhelm Storost (litove: Vilhelmas/Vilius Storosta, 1868-1953), orientprusia litovlingva lingvoinstruisto, verkisto, filozofo kaj teozofo. (Foto: Petras Šmitas)

# Per Esperanto al la havenurbo Klajpedo

Ĉe la kunfluejo de Balta maro kaj Kurŝa laguno situas la havenurbo Klajpedo: litove Klaipėda, germane Memel. En la venonta jaro ĝi gastigos la 56ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-56): Esperanto famigos la urbon kaj la urbo – Esperanton. Konatiĝi kun la dunoma, bunthistoria Klajpedo, la urbo, kiu en 2022 festos sian 770-jariĝon, indas ne nur al tiuj, kiuj venos partopreni en BET. Do, ek al la paseo!


En 1252 la teŭtona Livonia Ordeno (germana kavalira Livonia ordeno, reginta en Latvio kaj Estonio) konkeris la apudmaran baltgentan kasteleton ĉe la enfluo de la rivero Dané kaj samloke konstruis kastelon Memelburg, apud kiu formiĝis la urbeto nomita Memel.

La kavaliroj misopiniis, ke ĉi tiu loko estas la fino de la rivero, kiun ili nomis Memel. Tiu nomo estis kripligo de la litova rivernomo Nemunas (Esperante: Nemanio; mi preferus pli litovan formon – Nemuno): Nemunas → Memula → Memole → Memel (klarigo de la lingvistoj J. Užpurvis kaj V. Pėteraitis). Cetere, la litova grandduko Vytautas en la latinlingva letero de 1413 pri la kastelo skribis: Caloypede. En alia lia dokumento de 1420 estas sktibite: "castrum Memel alias Klawppeda". La du urbonomoj longe kunvivis paralele: la germana kiel la oficiala, kaj la litova, kiel uzata de lokaj litovaj vilaĝanoj.

La kastelo Memelburg baris al Litovio la maran vojon. Kompreninte la rolon de la haveno por libera komercado, grandduko Gediminas kun siaj taĉmentoj en 1323 sieĝis la kastelon, ne sukcesis konkeri ĝin. Por ne allasi la litovojn al la maro, la kastelon en 1328 transprenis alia, pli fortika teŭtona ordeno – la Kruckavalira Ordeno el Prusio. Litovoj poste kelkfoje okupis la urbon, eĉ bruligis la kastelon, sed ne kapablis radikiĝi ĉe la maro.

Pli trankvila vivo por la apudkastela urbeto Klajpedo/Memelo komenciĝis nur post 1422, kiam la Kruckavalira ŝtato kaj la Grandlitova duklando kun Pola reĝlando subskribis landliman packontrakton, en kiu la urbo Memel figuris kiel Cleupeda. Prospero al la urbo venis nur post kiam la agresema romkatolika Kruckavalira ŝtato en 1525 transformiĝis al la protestanta duklando Prusio, poste reĝlando Prusio. Ekde tiam en la lando oficialiĝis la publika uzo de la litova lingvo en preĝejoj kaj lernejoj, aperis la unuaj litovlingvaj eldonaĵoj, la ŝtataj dekretoj estis publikigataj ne nur en la germana, sed ankaŭ en la litova lingvo.

Klajpedo rapide evoluis, fondiĝis metiaj kaj komercistaj gildoj, komenciĝis ŝip-konstruado kaj mara komerco. En Klajpedo ekloĝis angloj, nederlandanoj, skotoj, svedoj. La urban prosperon ĉesigis la milito (1629-1635), kiam la urbon okupis svedoj. La urbo reviviĝis nur en la dua duono de la 18a jarcento – pro la vasta komercado kun Britio – el 996 ŝipoj, venintaj al Klajpedo en 1784, ĉ. 500 apartenis al Britio. Baldaŭ angloj kaj skotoj ekdominis la urban ekonomian kaj kulturen vivon. En la urbo iĝis uzata ankaŭ la angla lingvo.



Ve, la urbon tre damaĝis grandega brulego de 1854 – tiam plene malaperis multaj loĝkvartaloj, tri preĝejoj, 83 magazenoj. Tute hazarde ne forbrulis la deponejo, kie siajn varojn konservis entreprenisto H. Schliemann. Tio helpis al li riĉiĝi kaj poste malkovri Trojon. Cetere, fariĝinte fama arkeologo, li jam scipovis ne malpli ol 15 lingvojn.

Laŭ la decido de la postmilita Versajla Packonferenco (1919) la Klajpeda regiono, kiu ĝis tiam estis parto de Germana imperio, kiel “lingve kaj devene litova”, estis forprenita de ĝi kaj transdonita al la administrado de Francio. Tiu komence de la jaro 1923 planis transdoni la regionon ... al sia aliancano Pollando, kiu tiam okupis la Litovian ĉefurbon Vilno!

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# *Disiĝi por kuniĝi: Meditoj de nemovadano pri la estonteco de la Esperanto-movado*

**de Stanislav Belov**



Antaŭ kelkaj monatoj oni proponis al mi esprimi mian opinion pri la Esperanto-movado kaj ĝia estonteco. Post longa cerbumado mi decidis fari tion, kvankam mi ne estas movadano. Eble miaj pensoj instigos iun al plua cerbumado eĉ se kiel kontestata vidpunkto.

Unue mi rakontu pri miaj spertoj rilate Esperanto-organizaĵojn.

## **UEA**

Mi aliĝis al UEA en 2012 kiel dumviva membro kaj ne bedaŭras pri tio. Fakte mi faris tion ĉefe pro idealismaj konsideroj, dezirante kontribui al financa stabileco de la ĉefa Esperanto-organizaĵo. Krome mi celis ricevi rabaton de la libroservo, kvankam mi apenaŭ multe uzis ĝin, aĉetante plejparte dum UKoj, kie tiu rabato ne funkcias.

Miaj kontaktoj kun UEA limiĝas al ricevado de informaj mesaĝoj (plejparte tre formalaj – alparoloj, deklaroj ktp) kaj informoj pri novaj varoj en la libroservo (lastatempe malpli oftaj, sed foje interesaj) kaj partopreno en UKoj. Kelkfoje mi mendis librojn kaj ricevis ilin senprobleme. Mi ankaŭ ricevas pdf-version de la revuo *Esperanto* kaj eble rajtas elŭti aliajn eldonaĵojn, kion mi apenaŭ faras.

Mi ne povas plendi pri la menciitaj servoj. Kompreneble, ne ĉiuj kongresaj aranĝoj estis interesaj por mi, sed tio rilatas al ĉiu granda evento kaj mi ĝenerale uzas UKojn kiel nuran pretekston por vojaĝi kaj renkontiĝi kun diversaj homoj, plonĝi en aliajn kulturon kaj vivon.

Tobiasz Kaźmierski estis bonega kongresa asistanto, li rapide reagis al ĉiuj petoj kaj ĉiam klopodis trovi plej bonan solvon de ĉiu problemo. Luj plendas pri altaj kostoj de loĝado kaj ekskursoj, peritaj kaj organizitaj de UEA, sed eble tio estas sola ŝanco por la asocio gajni iom da mono. Amikoj diris al mi, ke ĉion ĉi ili ricevadis malpli



koste, mendante dum kongresoj rekte ĉe lokaj firmaoj. Do oni povas esperantumi malpli koste – necesas nur bone koni la anglan.

## TEJO

Miaj kontaktoj kun TEJO estas eĉ pli malabundaj. Kelkfoje mi publikigis artikolojn en *Kontakto* laŭ propono de ĝia redaktoro Rogener Pavinski. Nia komunikado ĉiam iris glate kaj mi povas konfirmi lian profesiecon.

Tute alian sperton mi havis pri la Internacia Junulara Kongreso de TEJO, konata en Esperantujo kiel IJK.

En 2016 mi kaj la kuba esperantistino Maria Lisandra planis kune partopreni la UKon en Nitro. Mi decidis partoprenigi ŝin ankaŭ en IJK, okazonta semajnon pli frue en Pollando. Tio evidentiĝis neplenumebla tasko pro unika miksaĵo de infaneco kaj senrespondeco, kiun mi renkontis ĉe la organizantoj.

Tiu morta teamo simple ne respondis al miaj mesaĝoj, kvankam temis pri aferoj ege gravaj, de kiuj dependis la ebleco de la partopreno. Post kelkaj semajnoj de tia stultumado mi skribis en Fejsbuko al la TEJO-prezidanto Boris Mandirola. Laŭ miaj laborspertoj, sinturno al la plej supera instanco kutime solvas tiajn problemojn. Se iu plendas al estro, ke ties subuloj ignoras klienton, sekvas publika ekzekuto kaj solvo de la problemo.

Kio sekvis ĉi-foje? La prezidanto trankvile respondis, ke li “peris la demandon al la organizantoj”. Pasis kelka tempo, kaj venis reago de tiu mirinda teamo: ili skribis, ke ili ne respondis al miaj demandoj, ĉar ili ne havis necesajn informojn. Post tio mi mense deziris sukceson al tiu infanĝardeno kaj nuligis la aliĝon.

La duan fojon mi kontaktis TEJOn en 2020, kiam mi duonŝerce proponis en komento ĉe Fejsbuko aranĝi IJK (pro subita rezigno de antaŭaj invitintoj) en mia urbo Tjumeno, kaj mi estis instigita verki invitilon. “Hm, eble tio povus esti interesa afero”, – mi pensis kaj plonĝis je la eksperimento. Mi jam aranĝis plurajn eventojn en mia urbo kaj ekster ĝi, do prepari renkontiĝon kun maksimume 150-200 partoprenantoj estus sufiĉe realisma tasko.

En 2018 mi aranĝis konferencon de junaj sciencistoj de Gazpromo kun komparebla nombro da aliĝintoj – kun ekskursoj, bankedo, paralelaj kunsidoj de kelkaj sekcioj kaj alveno de gravuloj el pluraj urboj. Kaj ĉion ĉi faris mia teamo, kies kerno konsistis el tri homoj, plenumantaj plej gravajn aferojn. La rutinan laboron mi taskigis al ekstera firmao, specialiĝanta pri tiaj aranĝoj. Mi pagis al ĝi nenion, tamen ĝia posedanto estis kontenta, ĉar ŝi gajnis sufiĉe per ricevado de rabatoj de servoliverantoj (hoteloj kaj luigantoj de ejoj) kiel aĉetanto regula kaj pogranda. Tia skemo ebligas kaze de neceso obligi organizan teamon sen financi tutjare plurajn oficistojn, necesajn nur dum kelkaj semajnoj aŭ monatoj.

La saman aliron mi decidis apliki ĉi-foje, do mi eĉ interkonsentis kun la posedantino (mia amikino), ke la invitilon mi sendos nome de ŝia kompanio. Ni preparolis eventeojn, eventualan programon kaj subtenon, kiun ni povus ricevi de lokaj

aŭtoritatoj. Post esplori la materialon pri organizado de IJK, mi plenigis la invitilan formularon kaj sendis ĝin al TEJO.

Unue ĝi perdiĝis, sed post ripeta sendo ĝi estis akceptita, pri kio oni informis en *Libera Folio*. Venis tempo trapasi la duan elektorondon, por kio necesis sendi novan invitilon. Mi ne trovis en la materialo postulojn pri tiu etapo kaj turnis min kun respektiva demando al TEJO.

La 12an de februaro venis respondo, ke specialaj postuloj ne ekzistas, necesas nur konkretigi la antaŭan proponon. Samtempe mi eksciis jenon: «Mi atentigas, ke en Rusujo TEJO havas landan sekcion. Dum tiel estas, nur REJM rajtus inviti IJKn en Rusujo ĉar “La kongreson invitas landa sekcio aŭ, se mankas landa sekcio en la kongresa lando, alia Esperanta organizo”. Komitato de TEJO konsentas ke en la 2a etapo kongreson kuninvitu REJM, tiel la kandidatiĝo validos». Do danke al mia demando mi hazarde eksciis, ke malgraŭ oficialaj anoncoj pri la akcepto, mia invitilo estas malakceptita, ĉar prezentita de malĝusta organizaĵo.

Mi serĉis tiun mirindan sekcion de TEJO en Rusio, sed vane. Jam supozante, kiel finiĝos ĉi tiu ludo, mi denove turnis min al la TEJO-oficejo kaj ricevis retroŝtan adreson de “komitatano A de REJM”, al kiu mi tuj sendis mesaĝon.

Atendinte ĝis la 27a de februaro, mi komprenis, ke miaj supozoj estis pravaj, kaj mi sendis la duan invitilon kun jena klarigo: “Mi provis trovi spurojn de tiu landa sekcio. Sed ĝi ne ekzistas kiel jura persono. Ne ekzistas ĝia retejo en Rusio. En la retejo de TEJO estas menciita ligilo al grupo ĉe la socia reto VK, sed tie aperas de tempo al tempo nur republikigoj de informoj el aliaj Esperanto-grupoj. Mi sendis mesaĝon al [Famulinomo], indikita kiel landa TEJO-respondeculo, sed neniu respondo venis. Post mia propono aranĝi IJK en Tjumeno, sendita al la Rusia Esperanta Unio, dum du tagoj okazis vigla diskutado forme de korespondado, sed neniu eĉ unufoje menciis landan sekcion de TEJO. Dum personaj interparoloj kun esperantistoj el Rusio (kaj ne nur) ĉiuj diris al mi, ke ili vidis neniun TEJO-aktivadon en Rusio dum pluraj jaroj. Do ni estu realistaj: landa sekcio de TEJO en Rusio ne ekzistas”.

Respondo venis la 8an de marto kiel oficiala anonco: TEJO elektis Sud-Koreion. En sekva publikaĵo ĉe *Libera Folio* Tjumeno eĉ ne estis menciita inter la kandidatoj, do evidente mia propono estis malakceptita.

Finfine, la 6an de aprilo venis respondo de “komitatano A de REJM”, kiu jam povus ŝanĝi nenion. Cetere en sia mesaĝo la “komitatano” nur skribis, ke li malofte kontrolas retroŝton kaj “malmulte aktivis pri movadaj aferoj”. La cirklo fermiĝis.

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Arkivo



“La 23an de septembro pasis duobla datreveno de Marianne Hubertina Vermaas: la 110a de ŝia naskiĝo en 1911 kaj la 30a de ŝia forpaso en 1991. Okaze de ĉi tiu memordato, Osmo Buller (same kiel f-ino Vermaas, longtempa direktoro de UEA) verkis artikolon pri ŝi.

Foto: F-ino Vermaas kun Grégoire Maertens (prezidanto de UEA) kaj Osmo Buller (direktoro de la CO) en la festo pri la fino de la rekonstruado de la CO la 18an de aprilo 1986.

# Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2021

**2.** Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Tomáš Pumpr** (1906-1926-1972), ĉeĥa juristo kaj esperantisto; elstara tradukanto, inter kies tradukoj estas *Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj* de K. J. Erben (1938), *La bapto de caro Vladimir* de K. Havlíček Borovský (1952), *Invito* de Č. Knobloch (1968), *Sileziaj kantoj* de P. Bezruč (kun aliaj, 1970), *Majo* de K. H. Mácha (1997), *Poŝatlaso de la mondo* (kun aliaj, 1971), pluraj tradukoj en *Ĉeĥoslovaka antologio* (1935) kaj multaj aliaj verkoj inkluzive de tri operoj; aŭtoro de esperantologiaj studoj, redakciano de *La Nica Literatura Revuo*, membro de la Akademio de Esperanto (AdE, 1962-72).

**6.** Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Kálmán Kalocsay** (Káloĉai, 1891-1911-1976), hungara kuracisto kaj elstara esperantisto, grave influinta la evoluon de la Esperantaj literaturo kaj lingvistiko per siaj verkoj; konsiderata kiel la plej grava Esperanta poeto (*Mondo kaj Koro*, 1921; *Streĉita kordo*, 1931; *Rimportretoj*, 1931; *Sekretaj sonetoj*, 1932; *Izolo*, 1939, eldonita en 1977) kaj poezia tradukanto (*Infero* de Dante, tri verkoj de Ŝekspiro, poemoj de Baudelaire, Heine, Petőfi, Madách... kaj la antologio *Tutmonda sonoro* kun tradukoj el 30 lingvoj); kunaŭtoro (kun G. Waringhien) de *Plena gramatiko de Esperanto* (1935, ekde la 4a eld.: *Plena analiza gramatiko de Esperanto* kaj de *Parnasa gvidlibro* (1932); aŭtoro de *Lingvo Stilo Formo* (1931), *La gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj* (1938), *Vojaĝo inter la tempoj* (1966) kaj frazeologia vortaro *Domfabriko* (1975); membro de la Lingva Komitato (LK, 1922-48) kaj AdE (1948-76), honora membro de UEA (1937).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 150-153.

**8.** Antaŭ 165 jaroj naskiĝis **John Mabon Warden** (Ŭordn, 1856-1903-1933), skota asekuristo kaj esperantisto, instruisto kaj disvastiganto de Esperanto, prezidanto de Brita Esperanto Asocio (1916-22), membro de LK (1909-33), membro (1920-33), vicprezidanto (1920-33) kaj prezidanto (1931-33) de AdE; kunaŭtoro de *Edinburga Poŝvortaro Esperanta* (1915), ĉefredaktoro de *La Sankta Biblio* (1926).

**10.** Antaŭ 65 jaroj naskiĝis **Floréal Martorell** (1956-1987-), franca elektristo, muzikeldonisto, kaj esperantisto; fondinto kaj gvidanto de la asocio EUOKKA (1988) kaj de la diskeldonejo *Vinilkosmo* (1990), kiu produktis pli ol 80 muzikalbumojn (kasedoj, vinildiskoj, KDoj, virtualaj albumoj); prezidanto de la Esperanto-Kulturcentro en Tuluzo (1992-2001), prezidanto de Mezpirenea Esperanto-Federacio (2000-03); direktoro kaj kunredaktoro de *Rok-Gazet'* (1990-2003), redaktoro de la programo *Esperanto-Magazino* ĉe Radio FMR (Tuluzo, 1988-2005); aŭtoro de centoj da primuzikaj artikoloj, ofta preleganto en Esperantaj kongresoj kaj renkontiĝoj, (kun)organizanto de pluraj esperantistaj muzikaj renkontiĝoj kaj

festivaloj; laŭreato de la premio Deguĉi (2009) kaj de la Esperanto-Kulturpremio de Aalen kaj FAME (2012).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 194-195.

**10.** Antaŭ 60 jaroj naskiĝis **Jean-Marc Leclercq** (leklér, 1961-1988-), Francia okcitana diverslaboristo, muzikisto, fondinto (1990) de la grupo *Les Rosemary's Babies*, verkisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel JoMo kaj jOmO; eble la plej populara nuntempa Esperanto-kantisto, fondinto de la grupo *Liberecanoj* (1996), kreinto de la unua rekordo de multlingva koncerto (22 kanzonoj en 22 lingvoj), kiu aperis en 2000 en la rekord-libro *Guinness*; ofta koncertanto en pluraj landoj, gastmuzikisto en pluraj Esperantaj albumoj; liaj Esperantaj albumoj estas *JoMo kaj Liberecanoj* (1998), *JoMo friponas* (2001), *JoMo slavumas* (2006), *jOmO okcitanas* (2016), *MARta kaj JOmo kantas MAYOMA-n* (2021).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 171-172.

**11.** Antaŭ 35 jaroj mortis **Xú Shēngyuè** (ankaŭ Xú Zhèn'è, 1901-1928/29-1986), ĉina literaturisto, profesoro pri literaturo en Orient-Ĉina Normala Universitato (Ŝanhajo), tradukisto kaj esperantisto; konata en Esperanto kiel Saint Jules Zee (ankaŭ S. J. Sü); Esperanta poeto kaj tradukanto, interalie de *Fajrolumo en la Fronto* de Liú Bejü (1950), *Sovaĝa Herbaro* de Lusin (1951), *La Plej Forta Voĉo de la Paco* (antologio, 1952), *Por Nova Afero Nova Maniero* (novelaro; kun aliaj, 1952), *La Felîĉo* de Qín Zháoyáng (kun Honfan, 1953), *El ĉina poezio* (antologio, 1980) k. a.

**18.** Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Cesare "Cezaro" Rossetti** (1901-1928-1950), svis-itala skotlandano, diversprofesiulo (kuiristo, vendisto, kolportisto) kaj esperantisto; aŭtoro de la populara romano *Kredu min, sinjorino!* (1950), tradukita en la anglan, hungaran, italan kaj japanan lingvojn.

**19.** Antaŭ 80 jaroj de germanaj okupaciintoj estis murdita **Leopold Blumental** (1865-1887-1941), Ruslanda, poste Pollanda juda juristo, ĵurnalisto, verkisto, tradukisto kaj esperantisto, konata kiel Leo Belmont; pioniro de Esperanto, disvastiganto de Esperanto en gazetaro; kunfondinto de Varsovia Esperanto-Societo kiel filio de la Peterburga Esperanto-societo *Espero* (1904), vicprezidanto de PEA ekde ĝia fondo (1908), poste ankaŭ prezidanto de PEA; aŭtoro de kelkaj originalaj poemoj en Esperanto, kompilinto kaj tradukinto de *Sonoj Esperantaj: Tradukoj el poetoj polaj kaj alilandaj* (1908), kuntradukinto de *Poemoj* de H. Heine (1928); membro de LK (1905-14, 1923-38) kaj de AdE (1928-38).

**26.** Antaŭ 40 jaroj mortis **Nguyễn Văn Kinh** (1916-1932-1981), vjetnama politikisto (membro de CK de Vjetnama Laborista [nun: komunista] Partio), diplomato (ambasadoro de DR Vjetnamio en Sovetunio, 1957-67) kaj esperantisto; en la junaĝo verkis artikolojn pri Esperanto en gazetaro kaj gvidis senpagan

korespondan Esperanto-kurson, kunfondis Koĥinĉinan Esperanto-grupon (1945); gvidis la unuan Esperanto-delegacion de DR Vjetnamio en la 44a UK en Varsovio (1959) kaj kadre de kunveno de MEM en ĉi tiu UK iĝis membro de la Internacia Komitato de MEM; certigis, ke malgraŭ papermanko en Vjetnamio dum la milito aperis pluraj libroj en Esperanto, revuo *Vjetnamio Antaŭenmarŝas* kaj vjetnamiuj numeroj de *Paco*; atingis, ke en decembro 1956 estis akceptita decido pri fondo de Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio (VPEA), kiu ricevis konsiderindan ŝtatan subtenon, kaj post la reveno al Vjetnamio en 1968 iĝis prezidanto de VPEA.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 214-215.

**27.** Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Werner Bormann** (1931-1947-2013), germana ekonomikisto, ŝtatoficisto kaj esperantisto; prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (1967-77), komitatano (1967-95), estrarano (1971-80), vicprezidanto (1974-77) kaj ĝenerala sekretario (1977-80) de UEA, prezidanto de LKK de la 59a UK (Hamburgo, 1974), membro de la financa komisiono de UEA (1992-95); vicdekano de AIS (1986), direktoro de Germana Esperanto-Instituto (1967-92), prezidanto de FAME-Fondaĵo (2000-05); membro (1976-2007) kaj prezidanto (1995-98) de AdE; aŭtoro de pluraj libroj (*Bona ŝanco*, 1970; *La lingva problemo en la Eŭropa Komunumaro*, 1977; *Funktion und Kultur des Esperanto*, 1981; *La evoluo de Esperanto kaj la Akademio*, 1984; *Inter senlaboreco kaj inflacio: priskribo de konjunkturpolitiko*, 1989; *Entreprenistaj strategioj: priskribo de la entrepreno*, 1991; *La merkato de trafikservoj: priskribo de la trafiko*, 1992; *Mondkomerco kaj lingvo*, 1993; *Elementoj de la esperantismo*, 1995; *Interlingvistiko – planlingvoj kaj iliaj ecoj*, 2004 k. a.) kaj de multaj artikoloj; honora membro de UEA (1993).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 42-43.

**30.** Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Jerzy Fornal** (1926-195?-2013), pola aktoro (rolis en ĉ. 90 spektakloj, dek filmoj kaj kvin filmserioj) kaj esperantisto; aktoro en ĉ. 20 Esperantaj spektakloj, deklamprogramoj kaj pantomimoj (*Aniaro* de H. Martinson, *Sopiro... laboro... espero...* laŭ poemoj de L. Zamenhof, *La arlekeno* de J. Korczak, *El la "Verda Biblio"* de I. Lejzerowicz k. a.); kunfondinto (kun sia edzino Zofia Banet-Fornalowa, 1983) de la Varsovia teatro *Espero*, kiu en 1998-99 kaj 2001-02 aranĝis ĉiumonatajn Esperanto-prezentojn en la artgalerio *Nusantara*; voĉiginto de Korvaks en la instruaj filmoj *Mazi en Gondolando* kaj *Mazi revenas al Gondolando* (1995); aŭtoro de du libroj: *Sopiro... laboro... espero...* (1994), *Virino en kvar bildoj* (1994); laŭreato (kun sia edzino) de la premio de la Fondaĵo Antoni Grabowski (1996).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 95-96.

**Aleksander Korjenkov**

# Marianne H. Vermaas, la brava virino



Marianne Vermaas – aŭ f-ino Vermaas, kiel ŝi ĉiam estis nomata – estis filino de esperantista familio. Ŝia patro Pieter J. Vermaas (1878-1942) estis unu el la kunfondintoj de la Esperanto-klubo Merkurio en Roterdamo, eble la plej elstara inter ĉiuj Esperanto-kluboj nederlandaj. Li estis arkitekto kaj pioniro pri la uzo de armita betono en Nederlando. Preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj desegnitaj de li detruigis en la bombardado de Roterdamo en majo 1940. Lia koro ne eltenis tion kaj li mortis pro aflikto du jarojn poste.

F-ino Vermaas ne lernis Esperanton pro trudo de la gepatroj sed pro la ekzemplo, kiel Esperanto riĉigis ilian vivon per kontaktoj trans limoj. La gepatra hejmo ofte akceptis vizitantojn el diversaj landoj kaj post kiam ŝi mem lernis la lingvon, apenaŭ ekzistis antaŭmilita famulo de la movado, kiun ŝi ne gastigis – de Julio Baghy ĝis Lidja Zamenhof, de Andreo Cseh ĝis Edmond Privat.

Ŝian esperantistiĝon rekte motivis la deziro partopreni en la Universala Kongreso en Stokholmo en 1934 kaj tiu sperto konkeris ŝin por la lingvo tutvive. Ekde tiam ŝi partoprenis ĉiun UK-on ĝis tiu en Hamburgo en 1974, post kiu ŝi forlasis UEA kaj partoprenis nur la kongreson de 1988 en sia hejmurbo. Ekde sia esperantistiĝo ŝi abunde vojaĝis, evitante amasturismajn lokojn kaj preferante kulture kaj historie interesajn. Ke ŝi ŝatis ne-laŭmodajn vojaĝcelojn, ŝi montris en 1936, kiam ŝi vizitis Leningradon kaj Moskvon, renkontante sovetajn esperantistojn.

Antaŭ ol Esperanto iĝis ŝia profesio, Vermaas laboris kiel fizioterapiisto aŭ kuracgimnastikisto, kiel oni tiutempe diris. Dum multaj jaroj ŝi estis estrarano de Nederlanda Asocio de Fizioterapiistoj.

Ekde sia junaĝo Vermaas aktive partoprenis en la kultura vivo kiel ofta vizitanto de koncertoj, ekspozicioj, teatraj k.a. artaj prezentadoj. Danke al ŝi disvolviĝis vigla kultura agado en Merkurio, kies sekretario ŝi estis dum jardekoj. Ŝia precipa amo estis teatro. Merkurio havis aktoran trupon, por kiu ŝi tradukis teatraĵojn kaj reĝisoris prezentadojn. Al ŝia artista amikaro apartenis la grava feminista verkistino Anna Blaman, de kiu ŝi esperantigis tri novelojn por la revuoj *Esperanto* kaj *Monda Kulturo*.

La nazia okupado devigis la nederlandan Esperanto-movadon daŭrigi sian agadon kaŝe. Dum antaŭe Merkurio kunsidis en unu el la plej imponaj hoteloj de la urbo, kie troviĝis ankaŭ ĝia riĉa biblioteko, post la bombardado, en kiu ankaŭ tiu hotelo detruigis, la loĝejo de Vermaas iĝis la sekreta kunsideoj.



F-ino Vermaas en unu el la Internaciaj Feriaj Esperanto-Kursoj de Lorenz Friis en Danlando fine de la 1930aj jaroj.

Komence de la milito okazis granda tragedio de la vivo de Vermaas, kvankam pri ĝi ŝi eksciis nur post la milito. Nome, en la jubilea UK de la 50-jariĝo de Esperanto en Varsovio en 1937 ŝi renkontis samideanon el la kongresurbo kaj amo ekflamis inter la du. En la posta jaro la amiko pasigis kelkajn monatojn ĉe ŝi en Roterdamo kaj en 1939 Marianne siavice en Varsovio. Kiam la situacio somere 1939 iĝis ĉiam pli minaca kaj la eksplodo de milito pli kaj pli verŝajna, ŝi devis interrompi sian restadon kaj forveturi per trajno, kiu poste montriĝis esti la lasta povinta forlasi Varsovion.

Post la milito f-ino Vermaas eksciis, ke ŝia juda koramiko estis fuĝinta al la orienta parto de Pollando, kie intertempe regis la soveta armeo, sed kiam la germana armeo invadis ankaŭ tien, lia sorto estis pereji kiel viktimo de naziismo.

Pri tiu historio f-ino Vermaas rakontis en letero al amikino, konfesante, ke ŝi ne plu povis imagi doni sian koron al iu alia ol tiu granda amo, kiun la besto de naziismo forrabis de ŝi. Tial ŝi ankaŭ en Esperantujo restis f-ino Vermaas por ĉiam.

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



# Kulturo



La 12an de septembro en la Centro Zamenhof (Bjalistoko) Przemysław Wierzbowski prezentis sian ĵus eldonitan Esperantan tradukon de la sciencfikcia romano *Solaris* de Stanisław Lem, kies fragmenton vi povas frandi en nia kulturrubriko, p. 91-97. (Foto: Nina Pietuchowska)

# La fino de l' eterno

En la serio pri rusaj romanoj de la 20a jarcento ne povas manki almenaŭ unu verko de la tiel nomata *vilaĝa prozo* (деревенская проза). Ne temas pri ĝenro, priskribanta la kamparanan vivon, ja pri kamparanoj verkis (post Turgenev, Dostojevskij, Tolstoj kaj aliaj rusaj klasikuloj) Bunin, Platonov, Panfjorov, Ŝoloĥov, sed oni ne konsideras ilin “vilaĝuloj” (деревенщички) nur pro la kampara temaro.

La vilaĝa (aŭ *kampara*, se vi preferas) prozo formiĝis en la Sovetunia rusa literaturo fine de la 1950aj jaroj, kiam post la iometa mildiĝo de la cenzuro aperis la eblo almenaŭ parte kaj alude montri la pezan staton de la rusa kamparo post la kolektivigo en la 1930aj jaroj, kiu dispremis la plurjarcentajn tradiciajn valorojn de la kamparo, kies loĝantaro restis mizera kaj senrajta ankaŭ post la milito (nur fine de la 1960aj la kolĥozanoj ricevis la pasportojn kaj la rajton forlasi siajn vilaĝojn) kaj post la absurdaj kamparaj (kvazaŭ)reformoj de la Ĥruŝĉova koterio.

La verkoj de la vilaĝula skolo neniom similas al la banalaj “sorealismaj” beletraj kaj filmoj pri la riĉa kaj feliĉa Sovetunia kamparo, kaj do ĉi tiuj verkoj estis eldonataj neofte kaj negrandkvante, ili estis ignorataj, kritikataj kaj mokataj de la oficialaj betonkapaj kaj de la okcidentemaj liberalaj “plumfratoj”; tamen ili trovis sian legantaron, kiu sciis aprezi ne nur la temaron, sed ankaŭ la verkistan talenton.

Inter la plej rimarkindaj vilaĝprozaj aŭtoroj estis Fjodor Abramov, Vasilij Belov, Vladimir Krupin, Boris Moĵajev, Vasilij Ŝukŝin, Vladimir Tendrjakov, Sergej Zalygin kaj Valentin Rasputin, fragmento el kies romano estas legebla en ĉi tiu *Ondo*.

Valentín Grigórjeviĉ Raspútin (Валентин Распутин, 1937-2015) naskiĝis en la vilaĝo Ustj-Uda ĉe la bordo de la rivero Angará. Li ekverkis kiel studento de la Irkutska universitato kaj post kelkaj jaroj de ĵurnalista laboro iĝis verkisto. Liaj plej konataj romanoj (en la rusa tradicio ili kutime estas nomataj “повесть”, sed ne “роман”; en Esperanto: romaneto, aŭ longa novelo) estas *Mono por Maria* (1967), *La lasta limdato* (1970), *Vivu kaj memoru* (1974), *Adiaŭo al Matjora* (1976) kaj la novelo *Incendio* (1985) aperinta sojle de la perestrojko.

*Adiaŭo al Matjora* havas realan bazon – komence de la 1960aj jaroj Ustj-Uda estis inundita kaj ties loĝantaro estis evakuita pro la konstruado de la Bratska akvoenergia centralo. Ĉi tiu temo ne estas nova por Rasputin, li jam en 1972 publikigis la verketon *Supren kaj malsupren laŭ la fluo*, en kiu verkisto Viktor revenas al sia inundita naskiĝvilaĝo, pli ĝuste al la nova “plansettlejo”, en kiu oni loĝigis la vilaĝanojn, kaj rapide fuĝas el ĉi tiu fremda kaj nerekonebla medio. Eĉ en Esperantujo oni konas ĉi tiun ideon per *La alta akvo* de István Nemere, kiu per referendumo de la legantaro de *Literatura Foiro* en 1986 iĝis la Verko de la Jaro.

Subakviĝos kaj pereos la insulo-vilaĝo Matjora, kiu dum tri jarcentoj ŝajnis eterna al ĝiaj loĝantoj. Subakviĝos kiel la mita Atlantido. Kiel la mita malnovrusa urbo Kiteĵ.

Matjora eltenis ĉion – militojn, persekutajn kampanjojn, kolektivigon, malsatojn, rabadojn, inundojn, sed ĝi ne eltenos la teĥnikan progreson. La fino de l' eterno...

Ĉi tiu drasta ŝanĝo en la vivo de la vilaĝanoj, kiuj devos esti evakuitaj el sia “malgranda patrujo”, neeviteble kreas dramojn kaj drametojn, kiujn Rasputin priskribas same majstre kiel la Siberian naturon, en kies sino li naskiĝis. Kun speciala forto li bildigas la scenon, en kiu la maljuna Darja Pinigina antaŭ la transdono de sia domo al la bruliga brigado kalkas kaj lavas ĝin, ja “ne lavinte la mortinton, ne vestinte ĝin per ĝiaj plej bonaj vestaĵoj, oni ne metas la mortinton en la ĉerkon”.

Katastrofo kaj fino por iuj, sed eble bonŝanco kaj komenco por aliaj, kiuj taksas la detruon de la tradicia vilaĝa vivo nur kromrezulto de l' progreso.

Mi ne rerakontos la romanon, nek la dupartan filmon (1981), kreitan en tragediaj cirkonstancoj: en 1979, komence de la filmado en vojakkcidento pereis la 41-jara reĝisorino Larisa Ŝepitjko kaj kelkaj membroj de la filmista grupo; la filmon finfaris ŝia vidvo Elem Klimov, kiu ŝanĝis la titolon al *Adiaŭo*. Legu la romanon kaj spektu la filmon en la rusa aŭ en via nacia lingvo. Tamen, kiel tradukanto, mi devas en la fino skribi kelkajn vortojn pri la Rasputina lingvaĵo.

Ĝi ne estas la sama tra la tuta romano: ja enestas kutima realisma priskribado, kaj folkloreca priskribado de la fantastaj estaĵoj (la mistera besteto Insulestro kaj la nedetrubla Cara Lariko), kaj rekta parolo. Ĝuste la rekta parolo kreas apenaŭ supereblan defion por tradukado al lingvo sen plurjarcenta tradicio de vilaĝa parolado fora de la literatura normo. Vi eble grumblos pro tio, ke en iuj frazoj de la matjoranoj mankas jen la artikolo, jen la demanda partikulo “ĉu”, jen la subjekto, sed aperas apostrofo nekutima en prozo, aŭ eble misas la poseda pronomo. Kredu, ke en la originala teksto tiaj “eraroj” estas pli oftaj kaj pli drastaj, tamen ja kutimaj por la rusa leganto, kiu konas ilin kaj en la parolado, kaj en la vilaĝproza ĝenro.

Do, se la lingvaĵo en la sekvaj paĝoj ne plaĉos al vi, ne insultu la aŭtoron, nek nian karan lingvon, insultu la nesufiĉe lertan tradukinton!

**Aleksander Korĵenkov**

## **Rusaj romanoj de la 20a jarcento**

1. Fjodor Sologub. *La eta demono* (LOdE, №292)
2. Andrej Belyj. *Peterburgo* (LOdE, №296)
3. Andrej Platonov. *Ĉevenguro* (LOdE, №303)
4. Maksim Gorĵkij. *La vivo de Klim Samgin* (LOdE, №304)
5. Miĥail Bulgakov. *La majstro kaj Margarita* (LOdE, №305)
6. Miĥail Ŝoloĥov. *La kvieta Dono* (LOdE, №306)
7. Boris Pasternak. *Doktoro Ĵivago* (LOdE, №307)
8. Aleksandr Solĵenicyn. *En la unua rondo* (LOdE, №308)
9. Valentin Rasputin. *Adiaŭo al Matjora* (LOdE, №309)
10. Aperos en LOdE, №310.

# *Adiaŭo al Matjora*

**de Valentin Rasputin**



## 1

Denove venis printempo, unu plia en sia senfina vico, sed la lasta por Matjora, por la samnomaj insulo kaj vilaĝo. Denove kun bruo kaj pasio la akvo forportis la glacieron, lasinte sur la bordoj montetojn de glaciaj rompaĵoj, kaj Angaro malfermiĝis libera, etendiĝinte je potenca brilanta fluego. Denove sur la supra kabo<sup>1</sup> vikle ekbruis la akvo, disruliĝanta je ambaŭ flankoj de la insulo; denove la verdo ekardis sur la tero kaj sur la arboj, falis unuaj pluvoj, alflugis apusoj kaj hirundoj, kaj dum vesperoj en marĉeto vivĝoje ekkvakis la vekiĝintaj ranoj. Ĉio ĉi okazis multfoje, kaj multfoje Matjora estis interne de la ŝanĝoj, okazantaj en la naturo, nek postrestante de la kutima sinsekvo de l' tagoj, nek devancante ĝin. Ankaŭ nun oni plantis legomojn, sed ne ĉiuj: tri familioj jam aŭtune disveturis al diversaj urboj, kaj ankoraŭ tri familioj eĉ pli frue forlasis la vilaĝon, dum la unuaj jaroj post la ekscio, ke la onidiroj pruviĝis veraj. Kiel ĉiam, oni plantis grenon, sed ne en ĉiuj kampoj: trans la rivero la grenkampoj ne estis tuŝita, kaj oni semis nur sur la insulo, pli proksime al la vilaĝo. Ankaŭ terpomojn kaj karotojn ĉiuj plantis ne samtempe, sed laŭ ebloj, kiuj kiam povis: multaj nun disŝiriĝis, loĝante en du domoj, inter kiuj estis ĉirkaŭ dekkvinkilometra vojo sur la rivero kaj sur la monto. Matjora estas la sama, kaj tamen ne la sama: la konstruaĵoj restas samloke, nur unu domon kaj banejon oni malkonstruis por brulligno, ĉio dume estas en la vivo kaj agado, plu same krias la kokoj, muĝas la bovinoj, kaj bojas la hundoj, tamen la vilaĝo jam velkis, estas videble ke ĝi velkis kiel nefinhakita arbo, deradikiĝis, forlasis la kutiman ritmon. Ĉio surlokas, sed ne ĉio estas en ordo: la urtikoj pli densas kaj arogas, morte rigidiĝis la fenestroj en la senhomiĝintaj domoj, kaj malfermiĝis la pordegoj al la kortoj – por la ordo oni fermis ilin, sed iuj malsanktaj potencoj ilin denove remalfermis, por ke la trablovoj fortiĝu, por ke ĉio grincu kaj frapu; bariloj kaj heĝoj kliniĝis, staloj, tenejoj kaj ŝedoj nigriĝis kaj malfortikiĝis; lignaj stangoj kaj tabuloj kuŝis senorde – ilin ne plu tuŝis la mastraj manoj, ordigantaj kaj ĝustigantaj por longa servado. En multaj domoj la muroj ne

estis kalkitaj, la ĉambroj ne purigitaj, mebloj jam estis duone transportitaj al la novaj loĝejoj, kaj vidiĝis la malgajaj anguloj kun skrapoplenaj muroj, kaj iuj aĵoj estis lasitaj endome, ĉar ankoraŭ necesis veni ĉi tien por iuj negravaj laboroj. Nun en Matjora konstante loĝis nur maljunaj homoj, kiuj okupiĝis pri la legomejoj kaj domoj, zorgis pri la brutoj, vartis la infanojn, konservante en ĉio la vivan etoson kaj gardante la vilaĝon de troa dezertiĝo. Dum vesperoj ili kunvenis, mallaŭte interparolis – ĉiam pri la samo, pri tio, kio okazos, ili ofte kaj peze suspiris, timeme rigardante trans Angaro al la dekstra bordo, kie estis konstruata granda nova plansetlejo. De tie venis diversaj onidiroj.

Tiu unua viro, kiu antaŭ pli ol tricent jaroj decidis ekloĝi sur la insulo, estis akrokula kaj profitema, ĝuste kompreninta, ke oni ne povas trovi pli bonan lokon ol ĉi tiu. La insulo longis je pli ol kvin verstoj, kaj ne kiel streta rubando, sed kiel gladilo, – en ĝi troviĝis loko por la grenkampo, arbaro, kaj por la marĉeto kun ranoj, kaj ĉe la malsupra insulofino post la zigzaga kanalo proksimis al Matjora alia insulo, kiun oni nomis jen Podmoga, jen Podnoga<sup>2</sup>. Klaras, kial ĝi estis Podmoga – en ĝi oni prenis tion, kio mankis en la propra insulo, sed tute neniu povis klarigi, kial ĝi estis Podnoga, kaj nun certe neniu klarigos tion. Ies stumblinta lango diris tion, kaj por la lango, kiel konate, estas ju pli bizare, des pli kare. En ĉi tiu historio estas ankoraŭ unu nomo aperinta neniu-scias-kie – Bogodul. Ĉi tiel oni nomis oldulon alvagintan de malproksimo, kaj oni prononcis lian nomon ukrainece: Bohodul. Sed ĉi-okaze oni ja povas diveni, kiel aperis la kromnomo.

La oldulo, kiu prezentis sin polo, ŝatis la rusan sakradon, kaj, verŝajne, iu el la venintaj kleruloj, aŭskultinte lin, diris en kolero: “Bogohul”, kaj la vilaĝanoj eble misaŭdis, aŭ eble speciale misprononcis ĉi vorton, transforminte ĝin al “Bogodul”<sup>3</sup>. Oni ne povas ĝuste diri, ĉu tiel okazis, aŭ aliel, sed ĉi tiu klarigo venas per si mem.

La vilaĝo dum sia ekzistado vidis multon. Barbozaj kozakoj iris preter ĝi supren laŭ Angaro por konstrui la Irkutskan kremlon<sup>4</sup>; al ĝi venis por noktumi negocistoj kiuj navigis supren kaj malsupren; laŭ la rivero oni transportis malliberulojn kaj, vidante de ŝipoj loĝatan bordon, remis ĉi tien, aranĝis lignofaĵojn, kuiris supon el fiŝoj kaptitaj ĉi tie; dum du plenaj tagoj okazis ĉi tie brua batalado inter kolĉakanoj<sup>5</sup>, okupintaj la insulon, kaj partizanoj, kiuj atakis irante en boatoj de ambaŭ bordoj. En Matjora konserviĝis barako, konstruita de kolĉakanoj ĉe la senarba supra kabo, en kiu dum la lastaj varmaj someroj kiel blato loĝis Bogodul. La vilaĝo spertis inundojn, kiam subakviĝis duono de la insulo, kaj super Podmoga – ĝi estis pli plata kaj pli malalta – la akvo turniĝis en teruraj turbuloj; la vilaĝo spertis incendiojn, malsaton, rabadon.

En la vilaĝo iam estis eta preĝejo, laŭregule konstruita sur alta pura loko, bone videbla de fore el ambaŭ riveraj branĉoj. Kiam estis fondita kolĥozo, ĉi tiun preĝejeton oni transformis je magazeno. Vere, pro manko de pastro ĝi ĉesis funkcii pli frue, sed sur ĝia supro restis la kruco, kaj la oldulinoj dum la matenoj direktis al ĝi siajn riverencojn. Poste ankaŭ la krucon oni forbatis. Estis ankaŭ muelejo lokita ĉe la fluo, kvazaŭ speciale por ĝi kreita en la supra insulofino, la faruno estis malmulta

por vendado, sed ja ne pruntita, kaj do ĝi sufiĉis por ke la vilaĝo havu sian propran panon. Dum la lastaj jaroj ĉiusemajne du fojojn en la malnova paŝtejo surteriĝis aviadilo, kaj oni kutimiĝis flugvojaĝi al la distrikta centro kaj al la urbo.

Do iel-tiel la vilaĝo vivis, en sia loko sur la alta maldekstra bordo de la insulo, renkontante kaj adiaŭante la jarojn, kiel la akvon, per kiu la vilaĝanoj komuniĝis kun aliaj loĝlokoj, kaj apud kiu ili dum longa tempo nutris sin. Kaj ŝajnis, ke, kiel ne ĉesas flui la kuranta akvo, ne ĉesas vivi ankaŭ la vilaĝo: iuj iris en la tombejon, sed naskiĝis aliaj, falis malnovaj domoj, sed oni konstruis la novajn. Ĉi tiel la vilaĝo vivis tricent jarojn, venkante ĉiajn plagojn kaj epokojn, kaj dum tiu tempo la supra kabo plilongiĝis je duona versto pro la alfluinta tero. Sed foje tondris la onidiro pri tio, ke la vilaĝo ne plu vivos. Malsupre sur Angaro oni ekkonstruis digon por akvo-energia centralo, la akvo en la rivero kaj en la riveretoj altiĝos kaj vastiĝos, inundos multajn areojn kaj inter ili unuavice Matjoran. Ja eĉ se oni metus sur Matjoran kvin same grandajn insulojn, la akvo inundos ilin, kaj poste eĉ ne eblos montri, kie iam la homoj loĝis. Oni devos transloĝiĝi. Estis malfacile kredi, ke la mondfino, per kiu oni timigis la malkleran popolon, nun efektive proksimiĝas al la vilaĝo. Unu jaron post la apero de la unuaj onidiroj per kutro venis taksa komisiono, kiu mezuris la trivitecon de la konstruaĵoj kaj fiksitis iliajn prezojn. Ne plu eblis dubi pri la sorto de Matjora, ĝi vegetis siajn lastajn jarojn. Ie sur la dekstra bordo estis jam konstruata nova plansetlejo por la sovrhozo, al kiu oni aligis ĉiujn proksimajn kaj eĉ neproksimajn kolhozojn, kaj estis decidite, por ne okupiĝi pri la senvaloraj domaĉoj, bruligi la malnovajn vilaĝojn.

Nun restis la lasta somero: aŭtune venos la alta akvo.

## 2

Tri oldulinoj sidis ĉe tablo kun samovaro; jen ili silentiĝis, verŝante teon en la subtasojn kaj glutetante ĝin, jen ili kvazaŭ nevolonte kaj lace daŭrigis sian nerapidan kaj mallaŭtan konversacion. Ili sidis ĉe Darja, la plej maljuna inter la oldulinoj; neniu el ili precize sciis sian aĝon, ĉar la precizeco restis en la preĝejaj baptoregistroj, kiujn oni ien forveturigis, kaj kiuj ne retroveblis. Pri la aĝo la oldulinoj parolis en jena maniero:

– Mi, knabin', jam portadis sur mia dorso mian fraton Vasjka, kiam vi ankoraŭ ne enmondiĝis, – Darja diris al Nastasja. – Jam mi estis memorkapabla, mi memoras.

– Tamen vi ja estas eble je tri jaroj pli maljuna ol mi.

– Ĉu je tri! Kiam mi edziniĝis, rememoru, kia vi estis! Vi ankoraŭ senĉemize kuradis. Vi ja devas memori mian edziniĝon.

– Mi memoras.

– Do jene. Ĉu vi povas kompari vin kun mi! Kontraŭ mi vi estas tute juna.

Sima, la tria oldulino, ne povis partopreni en ilia rememorado de la pasinteco.

Ŝi estis fremdulino, antaŭ malpli ol dek jaroj alportita al Matjora de hazarda vento el Podvoloĉnaja, ankaŭ vilaĝo ĉe Angaro, kaj tien ŝi venis el iu loĝloko proksima al Tula; laŭ ŝiaj vortoj, ŝi dufoje, antaŭ la milito kaj dum la milito, estis en Moskvo, sed en la vilaĝo al tio oni rilatis ironie laŭ la ĉiama kutimo ne tuj kredi tion, kion ne eblas kontroli. Kiel Sima, ĉi tiu senkapa oldulino, povintus vidi Moskvon, dum neniu el ili vidis ĝin? Kio do, ke ŝi loĝis proksime al Moskvo? Ja verŝajne oni ne enlasas ĉiujn dezirantojn en Moskvon. Sima senkolere kaj ne plu insistante silentiĝis, kaj poste denove reparolis pri la samo, kaj pro tio ŝi ricevis la kromnomon “Moskvulino”. Cetere, ĉi nomo taŭgis al ŝi. Sima estis tre pura kaj akurata, ŝi iomete sciis legi kaj havis kantaronojn, el kiu ŝi fojfoje ĉe taŭga humoro ĉantis enuajn kaj longajn kantojn pri la amara sorto. Ŝi evidente havis ne dolĉan sorton, ĉar ŝi devis multe suferi: ŝi forlasis dum la milito sian naskiĝlokon en kiu ŝi kreskis, naskis sian solan filinon kiu estis muta, kaj nun en la maljuna aĝo ŝi restis kun eta nepo, pri kiu ŝi devos iel zorgi por ke tiu iam povu komenci sian memstaran vivon. Sed Sima eĉ nun ne perdis la esperon trovi maljunan viron, apud kiu ŝi povus vivi kaj pri kiu ŝi povus zorgi: lavi la vestojn, kuiri kaj surtabligi la manĝojn. Ĝuste pro tiu kaŭzo ŝi siatempe venis al Matjora: eksciinte pri vidviĝo de avo Maksim kaj atendinte konvenan tempon, ŝi forveturis el Podvoloĉnaja, kie ŝi tiam loĝis, kaj venis al la insulo por trovi sian feliĉon. Sed la feliĉo ne kunmetiĝis: avo Maksim obstine malkonsentis, kaj la lokaj virinoj, kiuj ne tre bone konis Siman, ne helpis: kvankam la oldulo estis bezonata por neniu, fordoni sian oldulon al fremda lito estus ofendo por ili. Plej verŝajne avon Maksim timigis Valjka, la muta filino de Sima, jam tiutempe plenaĝa, sed en iu speciala maniero malagrabla kaj laŭte blekanta, nervoza, konstante postulanta ion. Pri ŝia malsukcesa svatiĝo la vilaĝanoj mokis: “Por Sima la celo malproksima”, sed Sima ne ofendiĝis. Ŝi ne renavigis al Podvoloĉnaja, sed restis en Matjora, ekloĝinte en forlasita dometo ĉe la malsupra rando de la insulo. Ŝi aranĝis etan legomĝardenon, starigis teksilon kaj teksis plankotapiŝetojn el ĉifonrubandoj – per tio ŝi vivis. Kaj Valjka, dum ŝi vivis kun la patrino, laboris en la kolĥozo.

Nun apud Sima turniĝis Koljka, ŝia kvarjara nepeto, la trovaĵo de Valjka. La knabeto, malkiel lia patrino, ne estis muta, sed li parolis malbone kaj malofte, kreskis nekomunikiĝema kaj timida, ĉiam tenanta sin ĉe la avina jupo – ne normala infano, sed virinido. La oldulinoj lin kompatis, karesis – li pli forte premiĝis al Sima kaj rigardis al ili kun iu neinfana, amara kaj humila komprenemo.

– Kio vi estas por tiel rigardi al mi? – Darja miris. – Kion vi vidas malantaŭ mi, ĉu mian morton? Mi mem sen vi scias pri ĝi. Jen la mutulo, enpikis sian rigardon kiel najlon.

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# La plej fama pollingva sciencfikcia verko

*Solaris* sendube estas la plej fama pollingva sciencfikcia romano, verkita de la majstro pri la ĝenro, Stanisław Lem (1921-2006).

Stanisław naskiĝis en juda familio de la kuracisto Samuel Lem en Lvovo (tiam en Pollando, hodiaŭ en Ukrainio). Tie en 1939 li trapasis la abiturientan ekzamenon kaj en 1940 – post kiam Sovetunio aneksis la regionon – pro la burĝa deveno estis neakceptita al la loka politekniko. Por eviti armean servon li komencis studi medicinon. La germanan okupacion li travivis, laborante kiel helpmekanikisto, kaj spuroj de tiu kruela periodo – pri kiu poste li preskaŭ neniam parolos – jen kaj jen aperos en liaj verkoj. Post la milito la familio Lem transloĝiĝis al Krakovo, kie Stanisław daŭrigis la studojn, sed neniam diplomiĝis. En polaj gazetoj komencis aperi liaj unuaj noveloj kun sciencfikciaj elementoj, kaj en 1951 – laŭ propono de la prezidanto de grava eldonejo – unuafoje oni eldonis lian romanon *Astronaŭtoj*. La sukcesan debuton sekvis, pro la cenzuro naskataj kun peno, pliaj, ne nur sciencfikciaj romanoj, inter kiuj menciindas *Stelaj taglibroj*, *Kiberiado* kaj *La hospitalo de la transfiguriĝo*, futurologiaj-filozofiaj eseoj (*Summa technologiae*), recenzoj de neekzistantaj libroj (*Perfekta vakuo*) kaj aliaj. En lia sciencfikcio ĉiam pli videblas pesimismo pri la homa intelekto kaj la eblo kontakti ne-homojn, resumita en la lasta romano *Fiasko* el 1987. Poste lian verkistan vivon okupis nur publikaĵoj. La aŭtoro, kies verkoj sume estis eldonitaj en 30 milionoj da ekzempleroj en pli ol 40 lingvoj, post la morto en 2006 estis plurfoje omaĝata per la nomoj de stratoj kaj sateloido, kaj la jaron 2021 – lian centjariĝon – la pola parlamento elektis la Jaro de Lem.

Ĝis nun malmultaj verkoj de Lem aperis en Esperanto. En la listo, kompilita de Ralph Dumain, ni trovas nur unuopajn ĉapitrojn el *Kiberiado* kaj *Stelaj taglibroj*, la teatraĵon *Luna nokto* (V. Melnikov) kaj la romanon *Surloka esploro* (J. Finkel), aperintan verŝajne nur rete.

*Solaris* estis unuafoje eldonita en 1961. La romano estis siaspeca revoluciaĵo en la sciencfikcio, ĉar ĝi prezentis tute unikan eksterteran estaĵon – la titolan planedon kovras ŝajne inteligenta oceano, havanta la povon stabiligi sian orbiton kaj krei plej bizarajn formaĵojn. Grandan parton de la teksto okupas la historio de la solaristiko – aparta scienco-branĉo dediĉita al *Solaris*, kies celo estis priskribi kaj kompreni kio okazas sur la planedo. La romano estas satiro pri la scienco, kies penado kompreni la universon montriĝas vana. Ĝi prezentas ankaŭ pesimisman vizion pri la homaj soleco kaj malforteco, fine – rakonton pri pasema, fatala amo.

La propono de Bjalistoka Esperanto-Societo al la Fondaĵo de Lem pri esperantigo de ĝuste ĉi tiu libro, omaĝe al la Jaro de Lem, estis akceptita. Por mi traduki ĝin estis ne nur plezura defio, sed antaŭ ĉio la efektivigo de mia revo kiel esperantisto – inter esperantigitaj kaj libroforme eldonitaj beletraĵoj vidi iun ajn klasikaĵon de Lem. Persone kontribui por tio, tradukante mian plej ŝatatan polan romanon, estis grandega honoro.

La libro estas aĉetebla ĉe la libroservo de nia asocio (espero.bialystok.pl).

**Przemysław Wierzbowski**



# Solaris

de Stanisław Lem



commons.wikimedia.org/wiki/File:Stanislaw\_Lem\_2.jpg

## Ĉapitro 1: Alveninto.

Je la dek-naŭa horo laŭ la ŝipa tempo mi malsupreniris, preter homoj starantaj ĉirkaŭ la puto, sur metalaj ŝtupetoj en la internon de la transportujo. En ĝi estis nur tiom da spaco, kiom necesis por levi la kubutojn. Post la enŝraŭbo de la konektilo en tubon, kiu elstaris el la muro, la skafandro ŝvelis, kaj de tiam mi ne povis fari eĉ etan movon. Mi staris – aŭ pli precize pendis – en aera lito firme unuigita kun la metala ŝelo.

Levinte la okulojn, tra konvekso glaco mi vidis la murojn de la puto kaj, pli alte, la kapon de Moddard klinitan super ĝi. Lia vizaĝo tuj malaperis kaj ekregis malhelo, ĉar desupre oni surmetis pezan protektan konuson. Mi aŭdis okfoje ripetatan fajfon de elektraĵ motoroj, kiuj fiksas la ŝraŭbojn. Poste siblon de aero enigata en skusorbilojn. La okuloj kutimiĝis al la senlumo. Mi ekvidis la palverdan konturon de la unusola ekrano.

- Preta, Kelvin? – eksonis en la kapaŭskultiloj.
- Preta, Moddard – mi respondis.
- Zorgu pri nenio. La stacio vin transprenos – li diris. – Bonan vojaĝon!

Antaŭ ol mi sukcesis respondi, io grincis supre kaj la transportujo ekvibris. Reflekse mi streĉis la muskolojn, sed nenio alia okazis.

– Kiam estos la starto? – mi demandis kaj ekaŭdis susuron, kvazaŭ de plej fajnaj sableroj ŝutiĝantaj sur membranon.

- Vi jam flugas, Kelvin. Restu sana! – respondis la proksima voĉo de Moddard.

Pli frue ol mi ekkredis tion, antaŭ mia vizaĝo malfermiĝis larĝa fendo kaj trans ĝi vidiĝis steloj. Vane mi penis trovi la ĉefstelon de Akvisto, al kiu flugis Prometeo. La ĉielo en ĉi tiu parto de la Galaksio diris al mi nenion, mi konis eĉ ne unu konstelacion, en la mallarĝa fenestroto daŭris fajrera polvo. Mi atendis la unuan stelon flagri, sed ne ekvidis tion. La steloj komencis nur fadi kaj malaperis, disfluante en la ĉiam pli rufa fono. Mi ekkomprenis, ke mi troviĝas jam en la supra tavolo de la atmosfero.

Rigida, volvita per pneŭmataj kusenoj, mi povis rigardi nur antaŭen. La horizonto plu mankis. Mi flugis kaj flugis, tute ne sentante tion, nur malrapide sur mian korpon verŝis sin varmego. Ekstere vekiĝis mallaŭta, akuta ĉirpo, kvazaŭ de metalo sur malseka vitro. Sen ciferoj, kiuj saltis el la aperturo de la ekrano, mi ne konscius pri la abrupto de la falado. Ne plu estis steloj. La lukon plenigis rufa heleco. Mi aŭdis la pezan marŝadon de mia propra pulso, la vizaĝo brulis, sur la nuko mi sentis friskan blovon el la klimatizilo; mi bedaŭris, ke mi ne sukcesis vidi Prometeon – ĝi devis esti jam trans la atingopovo de la rigardo, kiam aŭtomata ilo malfermis la lukon.

La transportujo tremis unu-du fojojn, ĝene ekvibris, la tremado iris tra ĉiuj izoltavoloj, tra la aerkusenoj, kaj invadis la internon de mia korpo – la palverda konturo de la ekrano malakriĝis. Mi rigardis tion sen timo. Mi ne veturis el tia malproksimo por pereji ĉe la celo.

– Stacio Solaris – mi vokis. – Stacio Solaris, Stacio Solaris! Faru ion. Ŝajnas, ke mi perdas la stabilecon. Stacio Solaris, parolas la alveninto. Respondu.

Kaj denove mi maltrafis la gravan momenton, en kiu aperis la planedo. Ĝi etendiĝis giganta, plata; laŭ la dimensioj de la strioj sur ĝia surfaco oni povis ekkompreni, ke mi estas ankoraŭ tre malproksime. Aŭ pli ĝuste – tre alte, ĉar mi transpasis tiun nekapteblan limon, ĉe kiu distanco al astro jam iĝas alteco. Mi faladis. Plu faladis. Nun mi sentis tion, eĉ ferminte la okulojn. Mi tuj malfermis ilin, ĉar volis vidi laŭeble multe.

Atendinte kelkdek sekundojn da silento mi reproviz voki. Ankaŭ ĉi-foje respondo ne venis. En la kapaŭskultiloj salve ripetigiĝis krakoj de atmosferaj malŝarĝoj. Ilia fono estis bruo, tiom profunda kaj basa, kvazaŭ ĝi estus mem la voĉo de la planedo. La oranĝkolora ĉielo en la luko blankiĝis. Ĝia vitro iĝis malhela; mi reflekse kuntiriĝis kiom permesis al mi la pneŭmataj bandaĝoj, antaŭ ol, unu sekundon poste, mi ekkomprenis, ke tio estas nuboj. Aro da ili flugis supren, kvazaŭ forblovita. Mi plu glisis, foje en lumo, foje en ombro, la transportujo turniĝis laŭ la vertikala akso kaj la giganta, kvazaŭ ŝvelinta sundisko regule traflugadis antaŭ mia vizaĝo aperante maldekstre kaj subirante dekstre. Subite, inter muĝoj kaj krakoj, rekte en la orelon komencis paroli fora voĉo:

– Stacio Solaris al la alveninto, Stacio Solaris al la alveninto. Ĉio en ordo. La alveninto estas sub regado de la Stacio. Stacio Solaris al la alveninto, estu preta por alboridiĝo en la tempo nul, atentu, mi komencas. Ducent kvindek, ducent kvardek naŭ, ducent kvardek ok...


**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Sovaĝa kuglo*

de **Mihail Korotkov**



## I

– Konatiĝu, kunuloj. Maksimo Gurejev, mia amiko, civila inĝeniero. Li sukcese konstruas nian urbon. Kaj tiu estas mia amiko Aŝoto Nazarjan. Li venis hodiaŭ el Erevano post mia alvoko. Astronomo kaj kompreneble alpisto. Sukcese malkovras novajn stelojn.

– Ĉu vi almenaŭ scias, kio estas “nova stelo”, babilulo?

– Kiam estos necese, mi ekscios. Kun via helpo. Nun mi ne havas libertempon. Mi invitis vin, viroj, tial, – Demidov frapis per sia manplato la paperan stakon sur sia skribotablo. – Eble ni povas elpensi ion kune. Mi mem ne komprenas tiun diablan aferon, kaj la tempo mankas. Mi ne relegos al vi ĉi tiun amason da dokumentoj. Mi diros koncize la esencon, vi mem komprenos, kio estas kio.

Li eltiris du foliojn el la stako da paperoj.

– Jen kopioj de dokumentoj, kiujn mi hazarde trovis en nia jura arkivo. Jen la unua dokumento. Atentu la daton. La 22an de junio 1971, je la sesa horo matene, la 19-jara studento A. I. Porfirov estis mortigita sur la placo Sovetskaja. La kuglo trapafis lin rekte. Juĝesploro estis efektivigita, sed ĝi donis nenion kaj fine estis ĉesigita. La dua dokumento. La 22an de junio 2001, sur la sama placo, ankaŭ je la sesa horo matene, estis mortigita N. V. Nadejev, dudekdujara, aŭtomekanikisto. La murdinto ne estis trovita, la enketo estis finita. Jen la aferoj, kunuloj. Ĉu vi komprenas ion?

– Demidov... – Nazarjan saltis de sia seĝo kaj kelkfoje marŝis tien kaj reen en la ĉambro. En momentoj de intensa ekscito, li kunpremis la pugnojn ĝis liaj fingrostetoj blankiĝis. – Aŭskultu, karulo, tio estas ia preskaŭ libra fikcio...

– Nu, tuj libra fikcio, – oponis Gurejev. – Estas amaso da nesolvitaj krimoj.

– Sed ne temas pri krimoj! Kvankam ĉio ĉi estas, kompreneble, ĉeno de krimoj. Rigardu, ĉie estas la 22-a de junio, ĉu ne? En 1941 la milito komenciĝis, en la 71a ĉi tiu studento estis mortigita, en 2001 la aŭtomekanikisto. Mi ne povas trovi sciencan klarigon ĉi tie, sed ĝi estas monstra! Ĉu vi, Demidov, pri tio volis diri?

– Jes. – Demidov, ankoraŭ tenante siajn du paperfoliojn, mordis la lipojn. – Dubinde estas, ke eĉ iu fizikisto klarigos tion al vi, sed mi pensas, ke mi ne eraras. En 1941 la 22an de junio, la nazioj eniris en nian urbon. Sur la placo ili pafis ĉiujn virojn, kiujn ili povis kapti, tio estas konata fakto. Kaj, probable, en tiu tago, io nekomprenebla okazis en la naturo, kaj iu sovaĝa kuglo komencis reveni al la sama loko unufoje ĉiun tridekan jaron. Tiel homo vivis, pri nenio malbona pensis, alflugis stulta kuglo – kaj fino al ĉio. Pro kio, oni demandas, kunuloj? Kie estas la senco en tio? Antaŭ tiom da jaroj la milito finiĝis kaj subite – jen havu!

– Vaj, pri kio vi parolas, Demidov? – Nazarjan tranĉis la aeron per sia manplato. – Kaj pro kio en 1941? Kia senco estas en tio?

– Nu, tie estis alia afero... Kvankam, kial ĝi diferencas? Vi pravas, Aŝoto, ne estas diferenco. Kaj en 1941 iu junulo estis pafita pro nenio, kaj en 1971, kaj en 2001, kaj kiu scias kien ĝi flugos, ĉi tiu kuglo...

– Kien? – diris Gurejev. – Do fakte hodiaŭ estas la dek-naŭa...

– Jen! Ĝi venos la 22an de junio 2031, tio signifas, ke post tri tagoj ies sango povus esti verŝita en nia urbo.

– Jen kio estas! – Gurejev frapis sian manplaton sur la tablon. – Ĉu vi ne povas fari ion?

– Do mi volas konsulti vin.

– Nu, mi proponas la plej simplan aferon: evakui ĉiujn loĝantojn de la domoj najbaraj al la placo por ĉi tiu tago, bari ĉiujn pasejojn, kaj diablo kun ĝi, lasu ĝin flugi. Kaj por fari ĉion ĉi, vi devas iri rekte al Ivano.

– Ĉu al Lazarev? – Demidov ridetis. Poste li diris, alparolante Nazarjan: – Lazarev estas samklasano de Maksimo kaj mi. Ĉi-jare li estis elektita prezidanto de la urbeŝtaro. Funkcio! Do, Maksimo, mi jam iris al Ivano. Kaj ĉu vi scias, kion li diris al mi? Unue li pensis, ke mi ŝercas. Poste, probable, li komprenis, ke oni ne ŝercas pri tiaj aferoj. Ie en la profundo de mia animo, li diras, mi kredas vin, sed ĉio estas tre nekredebla. Kaj mi, kiel la lasta kredemulo, fidos vin, evakuos milojn da homoj. Mi devos forlasi laboron poste nur pro mokado. Oni ne komprenos min! Nu, mem pensu, li diras, se vi returnos ĉiujn arkivojn, en ajna dato vi povas ajnan diablajn ĵongli. Vi kaj mi estas juristoj, Demidov, kial ni kredu ĉiujn ĉi sensencaĵojn? Resume, viroj, mi lasis lin kun la konvinkigo, ke mi estas kompleta malsaĝulo, kaj preskaŭ dankis lin, ke li malfermis miajn okulojn al la vero. Mi estis ĉe li antaŭhieraŭ. Kaj hodiaŭ tiu obsedo revenis. Kunuloj, se estas eĉ unu ŝanco el mil, ke mi pravas... Ne, diru al mi kion alian mi devas fari?


**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Ebriulo*

**de Paulo Sérgio Viana**



Malpura, ĉifona, fetora maljunulo, sed ankoraŭ homo.

Li falegis sur la trotuaron, apud malglata muro, kiu vundetis lian nazon. Maldika strio de koaguliĝinta sango ridinde kolorigis lian ŝvelintan nazon, misforman kaj oleecan. Vidinte la falon, du-tri preterpasantoj haltis por kontroli, kio okazis. Ili tuj konstatis, ke temas pri tute ebria maljunulo. Luj ridetis, aliaj spite me grimacis. Ebrieco ĉiam kaŭzas ridon kaj spitemon. La maljunulo sidigis sin apoge al la muro, rektigis siajn malgrasajn krurojn kaj murmuradis nekompreneblan balbutadon.

– Ĉu vi bezonas helpon? – iu demandis.

– Mi bezonas tri realojn por busbileto – la homo respondis per molaĉa voĉo.

Ĉiuj foriris, jam iom pentinte, ke ili ĉesigis sian iradon pro tia banalaĵo. Mi paŝis kelkajn metrojn, kaj mi turnis min, strange perturbita pro la figuro de maljunulo faleginta sur la trotuaro. Mi revenis.

– Kie vi loĝas?

Li ŝajnis ne aŭdi, okupita per sia nekomprenebla litanio. Mi ripetis la demandon, preskaŭ krie, kaj mi skugetis la ŝultron de la homo. Li klopodis levi siajn pezajn palpebrojn por rigardi min.

– Ĉe... strato... malantaŭ la preĝejo... de Sankta Antono...

Ĝi staras ne malproksime de mia propra hejmo. La maljuna ebriulo falegis sur mian trotuaron. Eble konvenas alvoki iun lian familianon, por lin forporti. Mankis ekscii la nomon de tiu homo, kiu sidas kaj grumblas sur mia trotuaro.

– Kiu estas via nomo? – mi plurfoje ripetis. Li responde miksis silabojn, ĝis mi divenis:

– Joĉjo Kana!

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Poemoj de Miguel Fernández

## PLIAFOJE

Ĉe la sojlo de nova operacio

*Kaj re mi solos  
antaŭ la blanka pordo,  
en blanka ĉambro, duonnude kuŝa  
inter blankaj littukoj de rullito.*

*Venos geviroj en kiteloj – blankaj –.  
Unu el ili al mi injektos dormon.  
Miaj timegoj dronos.  
Plej...*

*Tre longe poste ja ekjukos ĝenoj  
kaj eble eĉ doloroj,  
sed flegos min anĝel' blankakitela.  
Certe...  
Pliafoje...*

*Nun provas mi laŭeble  
elgliti el ĉi pensoj  
kaj vokas vokindulojn, vokindafojn:*

*Venu!*

*Venu al mia lago el pasinto!  
Venu al mia lago el futuro!  
Venu al mia lago nur el vivo!*

*Vivo!*

*Mi volas vori ĉiujn melodiojn,  
kiujn mi mem ankoraŭ ne elĉerpis,  
fojon post fojo ilin aŭskultinte.*




**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

## La unua verko de Roth en Esperanto

Roth, Joseph. *Hotelo Savoy* / Tradukis el la germana Tomasz Chmielik. – Ĝurĉevac: Dokumenta Esperanto-Centro; Bjalistoko: Bjalistoka Esperanto-Societo; Ŝvidnik: Libro-Mondo; Lublin: Ars Libri, 2017. – 114 p.

*Hotelo Savoy* estas unu el la pli nekonataj verkoj de Joseph Roth (1894-1939). Mi tre ĝojas, ke nun ankaŭ la legantoj de Esperanto povas frandi verkon de tiu elstara germanlingva verkisto. Roth ofte revivigas en siaj romanoj la etoson de iama Galicio, kiu post la unua divido de Pollando en 1772 fariĝis la plej orienta parto de Habsburga imperio. Tiu mondo kun ordo sen kaoso pereis dum la granda milito. Post militkaptiteco soldatoj venis en alian mondon. La “mondo de hieraŭ” (tiel iom nostalgie nomita de Stefan Zweig) ekzistis nur en ilia memoro. La revenantoj venis al novaj reĝimoj kaj nova ordo en konfuziga mondo. Neniu atendis iamajn militkaptitojn, nek bezonis mense kaj korpe kripligitajn eksoldatojn. La protagonisto de *Hotelo Savoy*, Gabriel Dan, estas unu el tiaj revenantoj:



Denove estis la tempo de revenantaj militkaptitoj.

Ili aperis en grupoj, multaj subite. Ili migris kiel iuj specoj da fiŝoj en difinita sezono. Ili estis pelataj de la sorto okcidenten. Du monatojn oni vidis neniun. Poste, dum semajnoj, milmiloj lavangis el Rusujo, Siberio kaj najbaraj landoj.

La polvo de la tramigitaj jaroj kroĉiĝis al iliaj botoj, al iliaj vizaĝoj. Iliaj vestoj estis ŝiritaj, ili tenis plumpajn kaj rompitaĵajn bastonojn. Ĉiam ili venadis sur la sama vojo, ili ne veturis per vagonaroj, ili migris. Dum jaroj ili marŝis, antaŭ ol ili atingis la celon. Ili konas fremdajn landojn kaj vivon kaj multfoje ili ŝanĝis la vivon same kiel mi. Ili estis vagantoj. Ĉu ili rehejmiĝis kun ĝojo? Ĉu ili preferus resti en la granda patrujo, ol reveni al la malgranda patrujo, al siaj edzino kaj infano, al varmo de la hejma forno? (p. 62)

Dan klopodas orientiĝi en tiu konfuziga mondo. Lu riĉa parenco ne volas gastigi lin, sed Gabriel trovis mizeran ĉambron en la hotelo Savoy. Li nur atendas eblecon por pluri, daŭrigi sian migradon okcidenten. La hotelo fariĝas spegulo de la socio:

La hotelo Savoy estis sama kiel la mondo, ekstere ĝi disradiadis brilon, el sep etaĝoj elŝprucis lukso, sed interne la mizero loĝis apud riĉeco, kio troviĝis supre, tio kuŝis malsupre, en la vastaj tomboj, kaj ili tavoloĝis sur la komfortaj ĉambroj de la satuloj, kiuj troviĝis sube, en kvieto kaj kontento, sen zorgadi pri malpezaj ĉerkoj.

Mi apartenis al tiuj, kiujn oni entombigis supre. Ĉu mi ne loĝas en la sesa etaĝo? Ĉu la sorto ne pelas min al la etaĝo oka? Ĉu estas nur ok etaĝoj, kaj

eble dek, dudek? Kiom alte oni povas ankoraŭ iri? En la ĉielon, en senfinan feliĉegon? (p. 26)

Vi legos, kio okazos kun tiu mondo sur la lastaj paĝoj.

*Hotelo Savoy* estas frua verko de Roth, sed nepre leginda kaj ĝuinda. Malkovru la originon de unu el la plej elstaraj germanlingvaj verkistoj de la pasinta jarcento.

Estas ege laŭdinde, ke la Esperanto-centroj en Kroatio kaj Pollando planas iom post iom eldoni la tutan verkaron de Roth. La eldono de *Hotelo Savoy* estas tre bela, bindita kaj kun zorga tipografia aranĝo. Ĉi tiu libro estas multe pli bela kaj eleganta ol la kutimaj eldonoj en nia lingvo.

Ni tamen devas paroli ankaŭ pri la traduko. Mi devas konfesi, ke mi legis la libron kun pli kaj pli kreskanta frustrado. Mi ne volas diri, ke ĝi estas malbona, sed estas sufiĉe da stumblaĵoj. Jen iuj detaloj, kiuj ĝenis mian legadon.

Roth spicas sian tekston per lokaj kaj malnoviĝintaj vortoj. Esperanto ne havas sufiĉe da rimedoj por rekrei tiujn specifajn odorojn kaj tial ŝajne ne aspektas tiel sukoplana kiel la originalo. Ni simple devas agnoski tion. Traduki estas elekti tiun vorton kaj ne alian. Oni povas diskuti, ĉu iu elekto ankoraŭ estas traduko aŭ jam interveno de la tradukanto. Kun la originalo apud mi, mi konstatis, ke mi ne ĉiam kongruas kun la elektoj de kolego Tomasz Chmielik, ekzemple, mi opinias, ke la kuzo estas “kara” kaj ne “amata” (p. 43). Mi ankaŭ povas malkonsenti sur sintaksa nivelo, ekzemple, p. 63, kie Tomasz tradukis “ili <...> infektis sin per sifiliso” kiam “oni <...> disvastigis sifilison” estus pli proksime al la originalo.

Roth konas la “epikan preteriton” (klasika ekzemplo: morgaŭ estis Krisnasko), sed ofte li decidas ne uzi ĝin. Unu ekzemplo el multaj sur p. 71 “Nigra kato trakuris la vojon”, sed en la germana Roth rakontas en nuntempo. Mi supozas, ke li, kiel lerta verkisto, scias, kion li faras kaj opinias, ke leganto de la traduko devus legi la elekton de la verkinto.

En multaj lingvoj oni distingas inter la intima kaj oficiala “vi”. En Esperanto ni apenaŭ uzas tiun distingon. Kolego Tomasz klopodas redoni ĝin per aldono de sinjor(in)o, sed tio povas aspekti iom komike por la nuntempa leganto, ĉar nuntempe ni uzas tiujn pronomojn alimaniere. Ekzemple, foje geamantoj nomas unu la alian sinjoro kaj sinjorino (p. 91).

La radikoj de la mi-rakontanto de *Hotelo Savoy* troviĝas en la viena kvartalo Leopoldstadt. Foje la traduko ellasas tiun informon (ekzemple en ĉap. 2), foje ni trovas la nomon, sed ankaŭ troviĝas la varianto “urbo de Leopoldo” (p. 83). Tio povas konfuzi legantojn. Nomoj estu la samaj tra la traduko, escepte se la verkinto ŝanĝas ilin. Ankaŭ por tio estas ekzemplo:

Unu persono en *Hotelo Savoy* estas la usona investanto Bloomfield, judo, kies origina nomo estis Blumenfeld. Roth nomas la patron konsekvence Blumenfeld kaj la filon Bloomfield, sed en la traduko estas ioma konfuzo (ekz-e p. 75 kaj 87). Kial?

Estas ankaŭ kelkaj stultaj eraretoj, kiujn atentema provleganto devintus trovi.



Jen iuj: “enirejo” anstataŭ “elirejo” (p.19), “kafo” anstataŭ “teo” (p. 21), “oka” anstataŭ “sepa” (p.26), “sifiliso” anstataŭ “gonoreo” (p. 59). En la traduko oni iam serĉas sinjoron “Fuchs” (p. 26), sed devus esti sinjoro “Fisch”. Banalaĵoj, certe, sed tamen makuloj.

Mi ripetas: mi ne volas aserti, ke la traduko estas malbona, sed ĝi povus esti pli proksima al la originalo. La leganto, kiu havas nur la tradukon, meritas tion.

Aperigi la kompletan verkaron de Roth estas ege aplaŭdinda projekto. Mi sincere esperas, ke la partoprenantoj havos la fortojn kaj rimedojn daŭrigi la eldonadon de Roth. Sed mi ankaŭ esperas, ke ili havos tempon kaj kompetenton por pli zorge legi kaj editori, kion ili publikigas.

**Wolfgang Kirschstein**

## Ĉio krom genio

**Melnikov, Valentin. *Ni vivas malgraŭ ĉio*. – Moskvo: Impeto, 2021. – 72 p.**

Valentin Melnikov (1957- ) estas interalie konata en Esperantujo kiel bona tradukanto de klasika rusa poezio. Ekzemple, pri lia traduko de la versromano *Eŭgeno Onegin* de Aleksandr Puŝkin (1799-1837) eldonita en 2005 Nikolao Gudskov skribas: “Valentin Melnikov faris grandan laboron, kaj lia traduko estas certe pli moderna, poezie glata kaj, averaĝe, pli adekvata ol ĉiuj antaŭaj” (*La Gazeto*, 2007, №3). Kaj Joxemari Sarasua: “Melnikov faris virtuozan laboregon donante Eŭgenon al esperanto. Li riveligis unua-ranga stilisto meritanta lokon inter niaj grandaj tradukistoj, surpodie kun de Diego, Hauptenthal aŭ Pokrovskij. Mi apenaŭ trovis formajn malglataĵojn, kaj la ŝajnaj stumblo-blokoj, disegaj tra la teksto, ŝuldiĝas kredeble al Puŝkino mem, ne al la tradukinto”; kaj “La traduko de Melnikov, kio koncernas pure lingvajn mekanismojn, ŝajnis al mi ne nur senriproĉe metiisma, sed rekte virtuoza” (*La Ondo de Esperanto*, 2007, №2). La du recenzoj legeblas rete ĉe [katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7427](http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7427) (mi mem siatempe legis la tradukon de Nikolao Nekrasov el 1931).

Nun aperas *Ni vivas malgraŭ ĉio*, enhavanta liajn originalajn verkojn en versa formo (plus kelkaj poemtradukoj kaj kurtaj tekstoj prozaj).

Ni havas (almenaŭ en Esperantujo) problemon pri la vorto poemo. Iuj uzas ĝin kiel sinonimon de versaĵo aŭ de rimaĵo, aliaj (inter ili mi mem) kiel sinonimon de poeziaĵo, nome de verko karakterizata de poezieco. Kaj poeziecon oni povas difini en diversaj manieroj. Se por vi poemo estas teksto verkita en laŭmezure regulaj versoj, prefere kun rimoj, ekzemple strikte laŭ la modelo de Parnasa Gvidlibro aŭ, pli precize, laŭ la tekniko de rusaj versistoj de la 19a jarcento (laŭdire plu valida kaj ŝatata ankaŭ en la Rusujo de la 21a), tiam eble ĉi libreto de Melnikov kontentigos



vin. Se, kontraste, por vi poezio estas aparta, ĝislima kaj translima, vortica uzo de la lingvo, permesanta esprimi aŭ almenaŭ aludi la neesprimeblan, tiam vi trovos nenion interesan en la versaĵoj kaj rimaĵoj de tiu ĉi verko.

Ni legu intercitilan trion el la tria kaj lasta el liaj *Sonetoj de Curen* sur p. 68:

*Sen rim', sen ritmo – jen la vers' moderna;  
liberas vortoj, kaj ne gravas senc'  
en la poemoj. Klaras ja tendenc'!*

Nu, por mi mem bona poemo devas esti unuavice, por uzi vorton el la supre menciita recenzo de Gudskov, sencosaturita, kaj la lingva teksturo (kiel ĝi sonas, legiĝas, gustas) devas kongrui kun tio.

Mi povas imagi ke la sukceso de Melnikov kiel tradukisto ŝuldiĝas, krom al lia zorga penado, ankaŭ al tio ke li jam havis kion diri; nome ke Puŝkin jam provizis la direndon, kaj li povis koncentri sian talenton al responda konstruado de fluaj versoj kaj trovado de taŭgaj rimoj en Esperanto.

En *Ni vivas malgraŭ ĉio* la aŭtoro ne havas multon (interesan, originalan aŭ atentindan) por diri jam de la ŝablona titolo mem, kaj ĉiaokaze temas pri kliŝaj poemformoj ujjantaj enhavon same kliŝan. Oni povas fiŝbuŝe miri ke multaj el tiuj rimaĵoj ricevis premion en literaturaj konkursoj (eĉ de UEA)... Interesatoj povas legi ĉi-librajn kaj aliajn versojn kaj plusajn verkojn de Melnikov en lia retpaĝo esperanto.mv.ru/Melnikov/. Interese, liaj miaopinie plej sukcesaj poemoj estas la tie legeblaj (kaj ial ne enlibrigitaj) “universoj / unuversoj”, laŭdifine senrimaj, kiel jena: “La vivo hardas nin. Sed kiucele?”.

Ĉi-libre Melnikov uzas rimojn ne ruse abortajn sed parnase plenajn ĝenerale lerte (foje la devo rimi obskurigas la sencon, aliffoje sed ne ofte li uzas rimojn trivitajn kiel *foli'/'papili'* – tiajn mi kutimas nomi rimokrimoj). Kiam li provas strofi senrime, la rezulto estas iuj palaĵoj kiujn li aŭdacis nomi hajkoj (p. 52-53). Entute pli sukcesas la pecoj humuraj kaj satiraj (kiel la unua limeriko sur p. 37), kvankam ankaŭ iuj pretendataj ŝercoj pri nasko de mulato, pri edza ĉufideleco aŭ pri gejo en TEJO kredeble pli kongruas kun la pensokadra aŭ mens-aranĝa panoramo en la Rusujo de la frua 19a jarcento.

Vortara parentezo: sur p. 13 li uzas la vorton “suĝeto”; mi supozas ke temas pri varianto de “suĵeto”, t. e. temo de beletra verko (vorto trovebla en la *Neologisma glosaro*, kun indiko ke uzis ĝin Nekrasov).

Konklude mi dirus ke, ju kaj kiam direndo mankas, aŭtoro prefere dediĉu sian talenton al tradukado, se eble de verkoj legindaj por nuntempa legantaro internacia. Des pli poeto.

**Jorge Camacho**

**Iĝu abonanto de “La Ondo de Esperanto”!**

# Simpla memoraĵo pri Gondolando

Korvaks. *Memorante Gondolandon*. – [Auckland]: [Korvaks], 2021.

Verŝajne, la plimulto de la legantoj memoras simplan, sed ĉarman animacian filmon *Muzzy in Gondoland*, kreita de BBC (Britia Brodkasta Korporacio) en 1986 kaj tiutempe suface vaste uzata por instrui la anglan lingvon por alilingvuloj. Mi, ekzemple, bone memoras, kiel tiu ĉi filmo estis popece prezentata en mialanda televido en populara porinfana programo komence de la 1990aj jaroj. En 1995 la filmo estis adaptita al Esperanto (sub la nomo *Mazi en Gondolando*) fare de IEI kun multaj voĉaj partioj, prezentitaj de niaj polaj samideanoj. Tiutempe (komputiloj ankoraŭ ne eniris nian vivon tiel vaste, kiel nun; la retaj teĥnologioj nur burĝonis) la adaptaĵo estis sufiĉe avangarda kaj frapa rimedo por altiri la atenton al nia lingvo kaj faciligi ĝian lernadon.

Sed, kompreneble, ĉio evoluas. De tiu tempo aperis multaj pli modernaj manieroj prezenti kaj instrui la lingvojn, do la filmo neeviteble iĝis eĉ se ĉarma, sed jam malnova historio. Tamen en la memoro de iuj ĝi daŭre okupas sufiĉe gravan lokon. Unu el tiuj personoj – anonimulo el Nov-Zelando (sin kaŝinta per la pseŭdonimo Korvaks, kiu estis ĉefa malbona heroo de la filmo) – decidis iel rememori kaj honori la filmon per malgranda (malpli ol 18-minuta) muzika albumo.

La kvin komponaĵoj prezentas, fakte, iom simplan perkomputile faritan muzikon, sur kies fono la aŭtoro multfoje miksis certajn voĉajn fragmentojn el la jam menciita filmo. Ĝenre la komponaĵoj similas iom malnovstile sonantan teĥno-muzikon. Veraj melodioj (en la strikta senco de tiu ĉi vorto) mankas: temas nur pri mikso de ripetiĝantaj fragmentoj (samploj). La muzikaj tembroj ne estas tro sintezilecaj, ĉio sonas ne tro plumpe, sed tamen ja sufiĉe tede por pli ol dufoja traaŭskulto.

La voĉaj fragmentoj el la filmo estis elektitaj kaj kunmiksitaj sen iu aparte rimarkinda ideo: simple ripetiĝas apartaj vortoj kaj frazetoj, tuj rekonataj de tiuj, kiuj spektis la filmon. Al la dialogoj, kiuj foje rezultas el la apudmeto de apartaj frazoj, mankas iu freŝo kaj sprito (kiu troveblis, ekzemple, en la komponaĵo *Tro da fungoj* de la bando *La Pafklik*, uzanta kelkajn eltiraĵojn el la sama filmo). Do, tiuj voĉfragmentoj estas prezentitaj nur kiel rekonigiloj kaj rememorigiloj de la filmo sen aldoni ion interesan aŭ allogan.



Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



En sia prezento de la 41a Boao Anina Stecay, influite de la Eŭropa Futbal-Ĉampionado, trovinte similecon en la situacioj de profesiaj sportistoj kaj de verkistoj, asertas, ke “la aprezo flanke de la publiko por aŭtoroj ofte estas la plej kara premio”.

Per originala prozo al ĉi tiu almanako kontribuis nur virinoj. Spomenka Štimec proponas por plia gustumo la duan ĉapitron de *Bastardo*. Se vi ne legis la komencon aŭ forĝis la vilaĝan knabon Maks – revenu al la 31a almanako, kie aperis la unua ĉapitro de la verkata romano. Dume ni ekscias, kien kondukis la kroatan knabon la maljunulo nominta sin “Großvater”, kaj kia sortoŝanĝo atendas la etan vilaĝanon.

Kiel endoma apero de onisko (ĝi ne estas insekto!) elvokas infanaĝajn memoraĵojn ankaŭ pri superstiĉoj rakontas Sara Spanò en *Vizitoj*.

En la rakonto de Ewa Grochowska ni ekscias, kiel kaŝita interkonsento povas pro sia riveligo detruiri rilatojn inter la filo kaj la (adopta) patrino por longa tempo. Kaj la kaŭzo – argentina tango kaj pasioj ĉirkaŭ ĝi.

Per originala poezio kontribuas Probal Daŝgupto, Germaine Hoffmann kaj Velerin Mitev (1942-2021).

La almanako prezentas grandan elekton de tradukita prozo, kies originaloj venas el la lingvoj bengala (Probal Daŝgupto tradukis *Birdo nomata kropsio* de sia patrino Manashi Dasgupta), sveda (*La lasta juĝo en Kretenburgo* de Henrik Bernhard Palmær, tradukis Sten Johansson), slovaka (*La muelejoj de providenco* de Oldřich Kníchal, tradukis Katarina Steele), hungara (du rakontojn de Anna Mécs tradukis István Ertl), angla (la novelon *La maskerado de la Ruĝa Morto* de Poe tradukis kaj enkondukis Hanso Becklin).

Ankaŭ por la tradukita poezio oni praktikas mallongan prezenton de la aŭtoro kiel ĉe Mircea Dinescu, kies kvin poemojn elromanigis Ionel Oneț, aŭ pli ampleksan enkondukon. Benoît Philippe prezentas la sacerdoton Ignaz Heinrich von Wessenberg, kies ideoj, laŭ Philippe, “havas frapantan similecon kun la homaranismo” de Zamenhof. Tion pruvas, interalie, la poemo *Mia kredo*, kiun li tradukis.

La intervjuo kun Vilmos Benczik *Rava pruvo de la homa kreivo*, tradukita de Jozefo Horvath, koncernas multajn facetojn el la agado de la elstara hungaro kiel pedagogo, tradukisto, literaturkritikisto, eldonisto, redaktoro, preleganto. Aldone aperas omaĝo, verkita de István Ertl por *Libera Folio*.

## La jarabono por 2022 kostas nur 15 eŭrojn

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Andrea Grevovich intervjuis Sebastian Schulman, verkiston kaj tradukiston el la jida kaj el Esperanto. Schulman estas la ĉefa direktoro de KlezKanada, unu el la plej gravaj mondaj institucioj pri klezmera muziko kaj jida kulturo. *Ambasadoro de tuta kulturo* estas titolo de la intervjuo tradukita de Mara Rockliff.

En sia artikolo Jens S. Larsen montras, kial UEA bezonas lingvot teorion, asertante, ke “estas pli grave kompreni ke Esperanto estas ne nur kulturo, sed ankaŭ lingvo, dum eble estas pli saĝe en la ekstera informado akcenti inverse”.

Brigid O’Keeffe estas aŭtorino de la libro *Esperanto and Languages of Internationalism in Revolutionary Russia* (“Esperanto kaj la lingvoj de internacieco en la revolucia Ruslando”, 2021). En *Plumamikoj kaj kvinjaraj planoj* (tradukis Kalle Kniivilä) ŝi eksplikas ĉefajn demandojn, kiuj inspiris ŝian libron, inter ili ankaŭ ĉi tiu: Kio motivis virinojn kaj virojn dum la lastaj jaroj de la cara Rusio kaj la frua Soveta Rusio aŭdi la internaciisman alvokon de Zamenhof kaj lerni Esperanton?

Vejdo analizas la originon kaj evoluadon de ĉinesko, ĝian populariĝon inter neĉinaj esperantistoj, montrante multajn poeziaĵojn.

Olga Tokarczuk, pollanda poetino kaj verkistino, socia aktivulino (oni kutime mencias ukrainan devenon de unu el ŝiaj avinoj), ĉeestas en BA per sia Nobelpremia parolado *Tenera rakontanto*, tradukita de Paweł Fischer-Kotowski.

Nicole Margot omaĝas al Philippe Jacottet, granda franclingva poeto, kiu forpasis en februaro en Svislando.

Al la recenzo de Valentin Melnikov pri la libro *Amo inter la ruinoj* (BA-39) respondas ĝia aŭtoro Trevor Steele per rezolutaj vortoj: “Mi estis tie!”

La estonaj aktorinoj Piret Simson kaj Liina Vahtrik, inspirite de la surdoma memorŝildo pri la fratinoj Helmi kaj Hilda Dresen kreis spektaklon *Doktoro Esperanto*, kies teksto en la traduko de István Ertl aperas en la almanako.

De Jorge Camacho venas detala analizo de la esearo de Humphrey Tonkin *Memoru ĉi praulojn*. Sten Johansson recenzas *Sekretan taglibron* de Julian Modest, kies verkoj abunde eldoniĝas en la lastaj tri jaroj. Fermas la recenzan rubrikon Jorge Camacho per prezento de la anglalingva libro *In an Antique Land* de la baratano Amitav Ghosh.

La kovrilan kaj rubrikajn bildojn kreis Niko Voloŝin.

**Halina Gorecka**

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Mozaiko



Ekde 2017 en *La Ondo* de tempo al tempo aperas kuirarta rubriko, en kiu ĝis nun estis prezentitaj sep tradiciaj pladoj el Ruslando, Orienta Eŭropo kaj Centra Azio. La oka plado, kiun oni sub diversaj nomoj konas en pluraj landoj, venas el Belorusio – terpomaj flan(et)oj “draniki”. Bonan apetiton!

# *Belarusaj terpomflan(et)oj "dranikoj"*

Dranikoj (prononcu: drániki; belaruse: *дранікі*), kio tradukeblas kiel raspitaĵoj, estas unu el la plej rekoneblaj kaj ŝatataj pladoj de la belarusa kuirarto. Kvankam similajn terpomflan(et)ojn/terpomkukojn oni konas en pluraj landoj de Eŭropo kun diversaj nomoj (ruse: *драніки*, ukraine: *дєруни*, jide: *latkes*, litove: *bulviniai blynai*, germane: *Kartoffelpuffer*, pole: *placki ziemniaczane*), la belarusaj dranikoj gajnis precipan popularecon danke al la speciala gusto, naciaj kuirartaj sekretoj kaj ecoj de la belarusaj terpomoj.

Kvankam Belarusio ne unuarangas en la mondo en la produktado de terpomoj, ĝi ĉampionas en la konsumado de terpomoj – laŭ la statistiko la averaĝa belaruso formanĝas pli ol 180 kilogramojn da terpomoj jare. La unikeco de la belarusaj specioj de terpomoj estas kaŝita en iliaj bonegaj kuiraj kvalitoj kaj alta procentaĵo de amelo, kio rezultigas pladojn precipe bongustajn.

En la belarusa kuirarto estas tia multego da pladoj el terpomoj – iam alportitaj kiel amerikaj ekzotikaĵoj – ke preskaŭ en ĉiu familio oni preparas terpomojn propramane. Krome, al la malnovaj receptoj hodiaŭ oni aldonas saŭcojn kaj aliajn ingrediencojn, por ke la pladoj estu pli facile digesteblaj kaj malpli kaloriaj, sed ĉe tio ili restu bongustaj.

En Belarusio dranikoj, pretigataj el terpoma raspaĵo, populariĝis antaŭ ĉirkaŭ ducent jaroj. Kutime oni manĝis ilin matene, ĉar ĉi tiu plado estas ne nur bongusta, sed ankaŭ tre satiga. La plej tradicia aldoniĝo por la varmegaj dranikoj estas hejma acidkremo. Aliaj oftaj aldoniĝoj estas butero, frititaj lardo- kaj cepo-pecoj.

Ne mankas aliaj manieroj surtabligi la pladon, ekzemple, en potoj: al frititaj dranikoj oni aldonas aparte frititajn pecigitajn cepojn, karotojn, fungojn, hejmfaritajn kolbasetojn kaj kremon. La tuton oni tenas en varmeta forno.

La bazo de la tradiciaj belarusaj dranikoj estas terpomoj, cepoj, salo kaj oleo. Ĉio ĉi estas tute sufiĉa, se vi uzas la bongustajn belarusajn terpomojn kun alta procentaĵo de amelo. Al la klasikaj dranikoj oni – male al la similaj pladoj en kelkaj aliaj regionoj – ne aldonas farunon aŭ ovojn kiel kunigilon. Se la "pastro" estas tro likva, belarusaj mastrinoj havas sian sekreton – por ne uzi farunon aŭ ovojn, ili verŝas el la raspita maso iom da suko, poste aldonas al la pasto amelon, kiu surfundiĝis en la ujo kun la suko.

Cetere, vi rajtas fantazii kaj laŭ sia gusto ŝanĝeti la klasikan recepton, aldonante al la pasto ovon, farunon, spicojn. Mi mem preferas la klasikan recepton, sed foje mi aldonas sekigitajn spic-herbojn, ekzemple, provencajn, kvankam mia edzo, la *Ondo*-redaktulo tute ne ŝatas eĉ etajn deflankiĝojn de la klasiko.

La recepto estas nekredible facila.

Ingrediencoj:

12 terpomoj, prefere el Belarusio

1 cepo

oleo

salo

Preparado:

Senŝeligu kaj lavu terpomojn, raspu ilin kune kun cepo (por konservi la koloron), uzante raspilon kun etaj truoj. Salu la paston kaj bone kirlu ĝin.

En pato varmigu oleon kaj elmetu la paston en formo de negrandaj flanoj. Fritu dranikojn ambaŭflanke ĝis orbruna koloro dum proksimume 2-3 minutoj.

Ĉio! Ili estas pretaj. Post kelkaj provoj vi trovos la idealajn proporciojn kaj fritodaŭron laŭ via gusto.

En Belarusio oni manĝas la dranikojn varmegaj, tuj post la fritado, dum ili havas siajn neripetebajn guston kaj aromon. Laŭplaĉe aldonu acidkremon, frititajn lardojn aŭ beran saŭcon (precipe bonas oksikoka saŭco). Eta glaseto da belarusia vodko (ekzemple, "La bluokula Belarusio" – tio estas ne reklamo, sed la elekto de mia edzo) akriĝos vian antaŭmanĝan apetiton, se vi – malkiel la vera belarusio – ial ne havas ĝin.

***Bonan apetiton!***

**Halina Gorecka**





# Ridu kune ni!

Du amikinoj babilas hejme. Sonoras telefono, la mastrino respondas kaj poste kviete rekroĉas la parolilon.

- Kiu telefonis?
- Ambulanco. Oni diris, ke mia edzo, kiun mi sendis por aĉeti terpomojn, estis trafita de kamiono kaj ĝus mortis en hospitalo.
- Terure! Kion vi faros nun?
- Mi ne scias. Eble rizon...

Junaj virinoj demandas sian ĝus akuŝintan amikininon:

- Kiel vi fartis dum la gravedeco?
- Dum la unuaj 20 sekundoj – perfekte!

Juĝisto demandas viron, kiu murdis sian edzinon:

- Kial vi murdis ŝin?
- Sinjoro juĝisto, vere, ŝi havis teruran, neelteneblan karakteron.
- Sed vi vivis kune dum dudek kvin jaroj!
- Nu, mi ĉiam prokrastis, prokrastis...

Du fraŭloj interkonatiĝis sur plaĝo. Unu sunumas kviete, sed la alia foriras ien kaj revenas entuziasma:

- Mi ĝus konatiĝis kun du ĉarmulinoj, ni povus pasigi belegan vesperon!
- Lia najbaro respondas indifere:
- Kara, kio estas via profesio?
  - Ŝoforo de kamiono.
  - Sed mi estas ginekologo. Imagu: vi venas al plaĝo por ripozi kaj ĉie estas kamionoj, kamionoj, kamionoj...

Du amikinoj babilas:

- Matene mi vidis mian eksedzon, kiu ofte kokris min.
- Ĉu?! Kie?
- Mi fosis en nia ĝardeno kaj subite trafis ion malmolan.

Dum amrendevuo:

- Post plia kiso mi estos via por ĉiam!
- Dankon pro la averto!

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

# **Spritaj splitoj kaj preskeraroj**

## ***El la kolekto de reduktoro***

### ***Ĉu eblus pli klare kaj klare?***

Transversa al ekskluzivaj religioj kaj ideologioj, Esperanto... moviĝas kun la sento de la mondo, la sento-ideo senhezite... La eĥo de tiom da lingvoj resonas delokigita por la avantaĝo de dialogo, vidalvide, klara kaj klara. (Marco Lucchesi: *La Lingvo kiel Promeso de Renkonto // Esperanto*. 2021, №7-8, p. 148)

### ***Kuniĝis ŝafaro***

Unuafoje post la pandemio: vigla ĉeesta Lana Kunveno en Tel-Avivo (Amri Wandel, listo esperanto-landa-agado, 16 jun 2021, trovis Ibrahim Bryzgaloff)

### ***Morala kunveno***

Mi invitas partoprenantojn de la Virtula Kongreso por neformala renkontiĝo la 5-an de aŭgusto 2020 je la 15-a horo UTC, t. e. la 17-a laŭ la mezeŭropa tempo en babilejo. (<https://m.facebook.com/groups/pola.retradio/permalink/10157382563928457>)

### ***Magra sed ne morba***

La Civita konsorcio gracilas, sed bonfartas (HeKo 751 8-C, 10 jan 2021, <https://www.esperantio.net/index.php?id=4193>)

### ***Tiu sento sen to***

Multas la informoj pri KCE kaj aliaj pakintaj establoj (HeKo 738 3-B, 1 jul 2020, <https://www.esperantio.net/index.php?id=4080>)

### ***Lamento mankhava***

Delonge ni priploras la neaktiveco de nia scienco faka asocio ISAE ([Konsilio de UEA] EKO 60 - jarfina kunresto kun AMO-rezultoj)

### ***Azenĉevala epoko***

Tiel okazas almenaŭ ĉe ni en Germanujo jam de mulmultaj jardekoj (Sebastiano, 9 maj 2020, <https://www.liberafolio.org/2020/05/04/la-estraro-forgesis-resa-nigi-la-financojn-de-uea/#comment-4246>)

### ***For retan malpuron!***

unu el sekvaj paŝoj planataj estas kreo de katalogo de utila Esperanta enlavo en la reto (<https://www.liberafolio.org/2020/03/31/kie-estas-la-duolinganoj/#comment-4228>)

Plukis **István Ertl**

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk.

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

**Ceĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

**Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

**Finnlando:** EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

**Hungario:** Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

**Katalunio:** Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

**Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefarett 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

**Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

**Pollando:** Bjalistoka Esperanto-Societo, Piękna 3, 15-282 Białystok. Rete: kontakt@espero.bialystok.pl

**Ruslando:** Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

**Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>